

LA ONDO de esperanto

Vortoj de Komitatano Z

Nova defio por
zamenhofologio

Ziko van Dijk (Sikosek)
doktoriĝis per Esperanto

Esperanto-urbo aktivas

Eŭropa parlamento pri
minoritataj lingvoj


Giorgio Silfer pri la tri
aŭtunaj estingiĝoj

PMEG: polemiko pri la
recenzo de Alen Kris

“La ruĝa floro”
de Vsevolod Garŝin

Orhan Pamuk kaj libroj,
kiuj lumigas homojn

“Ne!” al piratado kaj
sabotado en nia muziko



Decembro 2006. №12 (146)

Internacia sendependa magazino en Esperanto

La Ondo de Esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2006. №12 (146)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj:

Tatjana Auderskaja, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefona: (4012) 656033

Elektronika poŝto: sezonoj@gazinter.net

Hejmpaĝo: <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2007:

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 ruslandaj rubloj ĉe Галина Романовна Горецкая (236039 Калининград, аб. ящик 1205)

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Perantoj: vidu la liston sur la paĝo 27.

Konto ĉe UEA: avko-u

Recenzoj:

Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto: 700 ekzempleroj

Anonctarifo:

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato por ripeto en la sekva numero.

Donacoj:

La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

Oni povas represi materialon el "La Ondo de Esperanto" nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© La Ondo de Esperanto, 2006.



"La Ondo de Esperanto" (Волна Эсперанто). 2006. № 12 (146).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А.В.

Подписано в печать: 22 ноября 2006 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше.

Presita en Pollando.



Defendi la jam fositajn sulkojn

Esperantujon skuas minacanta malfondo de la Esperanto-redakcio de Pola Radio, kies sorto eble jam estas sigelita de la nova direkcio. La obskure dekstra kaj makartisme paranoja ŝtata regantaro akaparas la oficialajn informkanalojn kun decidaj paŝoj. Al la Esperanto-redakcio oni imputas komunisman influon. Ĝia estrino ja estis dungita dum la socialisma reĝimo kaj pluraj tiamaj mohikanoj plu asistas ŝin.

Ne estus perdo ne plu aŭdi propagandon de registaro, kiu estas unu el la plej mallumaj en Eŭropo kaj honto por EU, kiu kokete lekcias al aliaj pri demokratio kaj esprimlibero. Esperige ja estas, ke poloj mem ekhontas pri siaj estroj, kies populareco jam multe falis. Se la registaro tamen ne stumblos je internaj kvereloj, ŝanco pervoĉdoni pli bonan aperos nur post kelkaj jaroj.

Tamen nur parte la programoj estas registara laŭtparolilo. Ili ĉiam havis ĉefe kulturalan enhavon kaj konsiderindan porcion dediĉis al Esperanto-temoj, pro kio Varsovio fariĝis la plej populara stacio inter esperantistoj. Ordinara esperantisto ja volas aŭdi en Esperanto nur pri Esperanto, ĉar pri ĉio cetera onian scivolemon saturas la nacilingvaj komunikiloj. Iom da politika liturgio estas eta ĝeno, kiun oni akceptas kiel naturan prezon. Aŭdi ne postulas aŭskulti.

Koincide kun la minaco en Varsovio konvulsias *Ĝangalo* kaj ĝia Internacia Televido. Kompetentaj observantoj dekomence ne promesis al ili longan vivon, ĉar la ambiciaj celoj de ilia posedanto tro malkongruis kun la deziroj de esperantistoj. Ili povis pli vaste kaj rapide sekvi la Esperantan mondon per la ŝtata Pola Radio ol per la entreprenoj de Flavio Rebelo, kiu esperis vivi el la poŝoj de esperantistoj. Rebelo mokante ignoris ĉiujn, kiuj trovis Esperantujon tro eta merkato por liaj ambicioj. Al niaj bezonoj bone respondas la pli modestaj informservoj kaj televido, kiujn diversaj retfervoruloj jam starigis. Eble iu el ili kreskos al io pli granda laŭ natura evoluo kaj sen monavida sintrudo.

Roman Dobrzyński trafte diris en *Libera Folio* pri la krizo en Varsovio: "Ni devas defendi la jam fositajn sulkojn". Ni vere eniris stadion, en kiu ni defendu niajn atingojn kaj ne malŝparu fortojn por aŭdacaj konkeroj. Pri tio ŝajnas konscii Buller, laŭ kiu la malapero de *Fonto* estas pli serioza afero ol tiu de *Ĝangalo*. Corsetti laŭte ekmobilizis siajn rotojn kontraŭ la planoj en Varsovio. Jen bonaj signoj, sed la sulkojn devas defendi UEA, kiu estas mil membrojn malpli forta ol antaŭ kelkaj jaroj. Eble la freŝaj batoj komprenigas al ĝiaj gvidantoj, ke streboj plifortigi la pozicion de Esperanto ekster la propraj vicoj ne sukcesos, se la propraj vicoj ŝrumpas. Landaj asocioj degeneras, decaj landaj kaj fakaj revuoj malmultiĝas, libroservoj iĝas raraĵo. Ĉu pri tio diskutas la estraro aŭ ĉu ĝi plu revas konkeri EU? Komitatanojn la veraj problemoj ne interesas; anstataŭe ili faris komikan diskuton, kiel "malfermi UK eksteren". Restas ĉiam malpli por montri eksteren.

Komitatano Z

Sur la kovrilpaĝo de *La Ondo* unuafoje aperas portreto de Ludoviko. Per tio ni anoncas novan zamenhologian projekton.

Nova defio por zamenhofologio

Preskaŭ ĉiu esperantista societo okazigas en decembro kunvenon, renkontiĝon aŭ prelegon por rememori la vivon kaj kreadon de Ludoviko Zamenhof. Sed ĉu ni mem bone konas lian vivon kaj la ideojn, kiujn li proponis?.. Ŝajnas, ke la sincera respondo estas: “Jes, ni konas, sed ni ne bone konas”.

Tio ne estas mirinda, ĉar lian **vivon** ni konas laŭ libroj, kaj inter ili la plej legata plu restas *Vivo de Zamenhof* de Edmond Privat, eldonita antaŭ 86 jaroj. Facile legebla kaj emociveka, ĝi estis plurfoje reeldonita kaj tradukita.

Kvankam poste Privat povintus uzi la materialon de la *Originala Verkaro* (1929) kaj de la *Leteroj de L.-L. Zamenhof* (1948), por ĝisdatigi sian biografian romaneton, li ne faris tion, kaj baldaŭ ĉe UEA aperos la sepa eldono de la Privata teksto (feliĉe, kun aŭtentigitaj citaĵoj kaj kun komentoj de d-ro Ulrich Lins). Kaj realajn faktojn pri “Nia Majstro” ni prefere ĉerpu ne ĉe Privat, sed el aliaj fontoj, ekzemple, el la kompetenta *Senlegenda biografio* (1982) de Ludovikito. Oni devos posedi la verkotalenton de Privat, la “senlegendan” respekton al la faktoj de Ludovikito, kaj bonan konon de la historia fono por finfine doni al la esperantistoj interesan kaj fidindan priskribon de la Zamenhofa vivo.

Se tian priskribon de la vivo de Zamenhof ni devos atendi almenaŭ kelkajn jarojn (supozeble ĝis la jubilea jaro 2009), danke al la eldono de *Mi estas homo* (MEH) ni jam havas kolekton de liaj plej gravaj ideologiaj verkoj. MEH repruvas, ke la lingvo Esperanto estis nur parto de pli granda **ideo** al kiu li dediĉis sian tutan vivon.

Estas evidente, ke Zamenhof direktis siajn sociajn ideojn ne tiom al la esperantistoj, kiom al la granda mondo. Tamen sen ni, la mondo apenaŭ interesiĝos pri lia ideologia heredaĵo. Evidente nur ni mem povos diskonigi ilin per diverslingvaj tradukoj de liaj ĉefaj verkoj.

Entuziasmuloj jam proponis rapide traduki kaj eldoni la tutan MEH en tiuj lingvoj, en kiuj la *Unua Libro* aperis. Tamen necesas konsideri, ke, unue, ne ĉiu verko de MEH meritas internacian diskonigon, kaj ke, due, estas kelkaj

verkoj eksterMEHaj (ekzemple, *Esenco kaj estonteco...*), kiuj devos aperi en la nacilingvaj eldonoj.

La listo de la tradukotaj verkoj baldaŭ estos preta, kaj oni povos komenci tradukadon, sed antaŭ la eldono ni havos ankoraŭ unu tre gravan taskon. Ni devos enkadrigi la ideojn de Zamenhof en liatempa socia penso, klarigi ilian signifon por la nuna tempo, trovi la fontojn de lia doktrino, montri pozitivajn kaj negativajn flankojn de lia instruo. Necesos, interalie, kolekti kaj pritrakti kritikajn studojn pri la homaranismo kaj interna ideo, kiuj aperis dise en gazetaro Esperanta kaj nacilingva.

Ni ne scias, kiuj filozofiaj, sociaj kaj politikaj verkoj staris sur la librobretoj de Zamenhof, pri kiuj temoj li parolis kun neesperantistaj intelektuloj ktp. Tamen jam estas faritaj kelkaj provoj trovi parencecon de la Zamenhofa ideologio kun, ekzemple, framasonismo kaj bahaismo aŭ kun ideoj de konkretaj aŭtoroj.

Ekzemple, laŭ ruslanda filozofo kaj esperantisto Igorj Simonov, la ideologio de Zamenhof formiĝis sub influo de Vladimir Solovjov, la aŭtoro de la “tutunueco” (vsejedinstvo). Solovjov estis alte taksata de la ruslanda juda intelektularo pro kontraŭstaro al antisemitismo. Kompreneble, temas ne pri rekta ideopruntado, sed pri influo de la stilo de la soci-filozofia pensmaniero de Solovjov.



Pli rezerveme Simonov mencias influon de la juda filozofo Hermann Cohen, kiu en sia libro *Die Nachtensiebe im Talmud* (Amo al aliuloj en Talmudo) asertis ke Mesio venos nur post formiĝo de homgrupoj, kunvivantaj pace kaj harmonie, kiuj estos modeloj por la tuta homaro. Laŭ Cohen, la juda popolo devos esti ĉi tiu modela socio — ĉi tiu penso resonas en la frua homaranismo de Zamenhof.

Laŭ la svisa historiisto kaj interlingvisto Andreas Künzli, la *Homara Religio* de la franca pozitivistulo Auguste Comte, povis esti nereakta modelo por la homaranismo.

La ideoj de la franca revolucio, la usona “mikspoto”, la rusa kosmismo, la kristana ekumenismo kaj aliaj estas ankaŭ konsiderendaj, tamen unue oni esploru la influon de diversaj tendencoj en tiutempa juda socia vivo.

Temas, interalie, pri asimilismo, aŭtonomismo (rajto de minoritatoj), aŭto-emancipiĝo de Leon Pinsker, politika cionismo de Theodor Herzl, kaj precipe pri la ideoj de Aĥad Haam, la ĉefa oponanto de Herzl. Ja Aĥad Haam opiniis nenecesa elmigradon de la judoj, sed konsideris Palestinon nur kulturcentro de la juda diasporo, kiu ĉie havu kulturajn judajn ĉelojn sen politika karaktero. Al ĉi tiu koncepto de Aĥad Haam similas la Zamenhofa propono pri la hilelistaj temploj kaj rondoj.

Nun formiĝas grupo de kunlaborantoj pri ĉi tiu projekto, sed pliaj fakuloj pri filozofio, sociologio, religio, historio, tekstologio estas bezonataj por sistemigo kaj prezento de la Zamenhofa idearo al la mondo. Estas bezonataj bonaj tradukantoj kaj provlegantoj. Kaj, kompreneble, ĉi tiu defia projekto ne povos esti plenumita sen adekvata financado.

La defio estas granda. Baldaŭ ni vidos, ĉu en la nuna Esperantujo estas sufiĉe da intelektaj kaj financaj fortoj kaj rimedoj por digne prezenti al neesperantista publiko la mesaĝon de Zamenhof ne nur pri la solvo de la lingva problemo, sed ankaŭ pri la paca kunekzistado de diversaj popoloj, ŝtatoj kaj religioj, kaj pri la estonta unuiĝo de la homaro.

Aleksander Korĵenkov

UEA: la elektoj komenciĝas

Per oficiala alvoko pri kandidatoj por la elekto de komitatoj B, en la novembra numero de la revuo *Esperanto*, komenciĝas la renovigo de la gvidorganoj de UEA por la trijara oficperiodo 2007–2010. La procezo kulminos en la Jokohama UK per la elekto de la Estraro de UEA fare de la Komitato, kies nova konsisto ekoficos en la sama UK.

La komitatoj B reprezentas en la supera organo de la Asocio la individuajn membrojn. Oni elektos unu komitatanon B por ĉiu komencita milo da individuaj membroj laŭ la nombro en la antaŭelekta jaro. En la nuna Komitato estas ses komitatoj B, sed en la nova Komitato estos por ili sep lokoj, ĉar intertempe la individuaj membroj denove nombras pli ol 6000.

Minimume dek individuaj membroj de UEA, kiuj reprezentas minimume tri landojn, rajtas proponi kandidaton. Tiu ĉi devas skribe akcepti la kandidatigon kaj deklari siajn movadajn celojn. La akcepto kaj deklaro rajtas kune ampleksi maksimume 150 vortojn. La kandidatigoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis 28 feb 2007. Validaj estas nur dokumentoj kun originalaj subskriboj. Retpoŝta aŭ faksa sendo de kandidatigoj ne estos valida. Se la nombro de kandidatoj superos sep, la individuaj membroj elektos la komitatanon B per poŝta balotado.

En la antaŭkongresa periodo estos elektataj ankaŭ la komitatoj A por reprezenti la aliĝintajn landajn kaj fakajn asociojn, kiuj havas minimume 100 membrojn. La aliĝintaj asocioj kun malpli ol 100 membroj rajtas nomumi observanton. La komitatoj A kaj B rajtas kompletigi la Komitatan elektante komitatojn C, kies partoprenon en la Komitato ili trovas utila pro iliaj specialaj spertoj kaj kapabloj. La nombro de komitatoj C rajtas esti maksimume kvarono de la nombro de komitatoj A kaj B.

La elektadon de la komitatoj B gvidas la Ĝenerala Direktoro, de kiu interesitoj povas peti informojn kaj konsilojn pri la proceduro. Li ankaŭ donos instrukciojn al la aliĝintaj asocioj pri la elekto de komitatoj A kaj observantoj. La elektadon de komitatoj C kaj de la Estraro gvidas la Elekta Komisiono, kies membroj estas István Ertl (Luksemburgio), Janez Jug (Slovenio), Lee Chong-Yeong (Korea Respubliko) kaj Edvige Tantin Ackermann (Italio).

GK UEA



Ingeborg kaj Ziko van Dijk, kun la diplomocilindro

Doktoriĝo per Esperanto

3 nov 2006 okazis en Utrecht (Nederlando) doktoriĝo pri la historio de la Universala Esperanto-Asocio. Ziko van Dijk, germana historiisto, publike defendis sin kontraŭ la demandoj de komisiono, en kiu estis ankaŭ la tutnederlande famaj historiistoj Herman von der Dunk kaj Maarten van Rossem. Post laŭdacio de la doktoriganto Duco Hellema, profesoro pri la historio de internaciaj rilatoj, kopromotoro Marc van Oostendorp aldonis pli personan gratulon en Esperanto.

Ziko van Dijk, kiu antaŭ sia edziĝo nomiĝis Sikosek, priskribis la historion de la monda asocio kun atento al politikaj demandoj. Fakte, vere okazis politikaj kunpuŝigoj kaj problemoj por UEA, ekzemple rilate al la agadoj de Hitler kaj Stalin, sed aliflanke kelkaj esperantistoj misuzis politikon por kamufli personajn ambiciojn. Ĝenerale, la Asocio sufiĉe bone trairis la tempestojn de la 20a jarcento, sed ofte devis sin adapti al la eksteraj kondiĉoj.

Kiaj estis la kazoj Hans Jakob kaj Ivo Lapenna? Ĉu sovetianoj simple povis membriĝi en UEA? Ĉu judoj povis esti delegitoj dum la Hitler-regado? Kiel la Asocio akceptis la germanojn post la Dua Mondomilito? Kion oni opiniu pri la altaj membronombroj en orientaj asocioj? Kvankam en la centro de la libro estas UEA, necesis okupiĝi ofte ankaŭ pri unuopaj landoj. Bazo estis, krom intervjuoj, gazeta trastudado kaj legado de la koncerna literaturo, precipe la Arkivo de UEA, kiun van Dijk rajtis uzi.

La rezulto estas 459-paĝa german-

lingva libro *Die neutrale Sprache. Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes* (Bydgoszcz, 2006). La prezento, ilustrita per parte nekonataj fotoj el la historio de UEA, flue iras tra la jardekoj kaj timas tiun aŭ jenan anekdoton. Fine de novembro 2006 *Die neutrale Sprache* iĝas havebla ĉe la grandaj Esperanto-libroservoj aŭ ĉe la aŭtoro. Inter la familianoj kaj esperantistaj gastoj dum la defendo estis ankaŭ Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA, kiu poste invitis van Dijk prezenti la libron dum la Malferma Tago.

Universitato Utrecht
Ziko van Dijk

Prelegi en Jokohamo

Dum la 92a UK en Jokohamo okazos la 60a sesio de Internacia Kongresa Universitato, kie rajtas lekcii universitataj profesoroj kaj personoj kun simila kvalifiko.


UEA invitas tiajn personojn rete aŭ papere prezenti siajn proponojn pri prelegoj al prof. dr-o Christer Kiselman (✉ kiselman@math.uu.se ✉ pk 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio), plej laste 31 jan 2007.

Okazos ankaŭ studsesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Membroj de AIS estas invitataj proponi kurson, kies unua lekcio funkcios samtempe kiel IKU-prelego.

Propono enhavu mallongan (ĉ. duonpaĝan) resumon de la prelego kaj koncizan (ĉ. duonpaĝan) biografieton kun persona bibliografio.

Aparte bonvenaj estos prelegoj rilate al la kongresa temo, kiu estas *Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto*.

GK UEA



Esperanto helpu komunikiĝi

14–15 okt 2006 la 38a Korea Kongreso de Esperanto okazis en Centro por Evoluigo de Homa Rimedo en POSCO (Pohang Ŝtal-Kompanio) en la bela havenurbo Pohang sud-oriente de la Korea duoninsulo. Al la kongreso aliĝis 131 personoj inkluzive de 19 fremdlandanoj el Ĉinio, Japanio kaj Tajlando. La kongresa temo estis “La Rolo de Esperanto por kontribui al regiona komunumo”.

Estis fakaj kunsidoj: Korea sekcio de ILEI, SAT-anoj, Espera Monto, Katolikismo, Kristanismo, Ŭonbulismo, Rondo, kaj aliaj.

En kongresa universitato prelegis d-ro Kawanishi Tetsuro (Japanio) pri “Sano kaj korpa movo en referenco al Taegukkwon laŭ esploranalizo de kuracisto pri rehabilitado” kaj prof. So Jin-Su pri “Rokarto de primitivuloj en Altajo de Mongolio”.

Kadre de la kongreso okazis simpozio pri la kongresa temo, en kiu prelegis d-ro Park Wha-Chong (vicprezidanto de KEA) pri “Medicina servado al socio per Esperanto en Kyeongbuk-filio”, pastoro Ha Gwang-Rak pri “Lingva instruado por la nekoreaj laboristoj” kaj s-ro Ho Song (KEA-estraro pri eksteraj aferoj) pri “Kiel koreaj Esperantistoj kulture interŝanĝu kun edziniĝintaj enmigrintoj kaj enmigrintaj nekoreaj laboristoj?”

Oni povas jene resumi la kongresajn diskutojn: “Pro la rapide malvastiĝanta terglobo multaj homoj transloĝiĝas en fremdajn landojn kaj ofte suferas pro lingvaj muroj. Nuntempe en Koreio troviĝas multaj nekoreaj laboristoj kaj edziniĝintaj enmigrintoj. Ili suferas kaj fojfoje malprofitas pro malfacileco de komunikado. Do kiamaniere ni, esperantistoj povas helpi la malfortulojn per Esperanto? Kaj kiel ni povas disvastigi nian lingvon al tiuj, kiuj urĝe bezonas komunikiĝi kun fremdlingvanoj?”

Kaj oni konkludis, ke unue necesas sciigi la enmigrintojn pri Esperanto-komunumo, kiel pri ilia amikaro, per medicina servo kaj ceteraj. Per tio multaj el ili interesiĝos pri Esperanto aŭ favoros ĝin, ĉar plejparto de ili ne tuj povas sukcese lerni Esperanton pro la manko de tempo.

La kongreso estas tre sukcesa. Multaj kongresanoj laŭdis la lokajn organizantojn ankaŭ pro la bela kongresejo, kaj abundaj artaj programeroj kaj tre bongustaj manĝaĵoj en la interkona vespero.

Kim Uson



Semajno de Turismo kaj Kulturo

La 14a Internacia Esperanto-Semajno de Turismo kaj Kulturo, okazinta 24 sep – 1 okt en Pineda (Hispanio), tute plenumis sian antaŭvidon. Unue pro la 115 gealiĝintoj el 14 landoj kaj ĉeesto de la urbestro Josep Poblet, kiu salutis la gekongresanojn kaj malfermis la eventon.

Due pro la agrabla klimato, kiu permesis okazigi apud la maro kunvenojn kaj la folkloran kuban muzikon “Habeneras” fare de la ensemblo *Montjuic*.

Trie pro la aktiva partopreno de la gesamideanoj en la diversaj eroj de la programo. La salono ĉiam estis plenkuna dum la tri prelegoj de Wolfgang Gunther, Husejn Al-Amily kaj Choi Man Won.

Same okazis dum la aktorado de la Montpeliera trupeto *ĜO-JO*, gvidata de Josè Boccadifuoco, prezentinta teatraĵon kaj skeĉojn, originale verkita en Esperanto por IES-14 — la publiko aplaudis entuziasme ĉiujn scenojn. Eĉ dum la lecionoj de la Esperanto-Kurso, pli ol 50 gelernantoj sekvis atente la eksplikojn kaj sugestojn de la instruisto.

Surprizan intereson vekis unu el la tri Interkonaj vesperoj, kiam la Organiza Komisiono proponis, ke iuj gesamideanoj kantu kanton en sia respektiva nacia lingvo. Post iom da hezito 15 gevolontuloj montris la riĉecon de la muziko de nia lingva mondo. Evidente, dum la tri Interkonaj Vesperoj, la OK invitis al ĉiuj personoj gustumi ĉampanon “cava” Esperanto.

Okazis tuttaga ekskurso en la urbo Lleida, kaj du duontagaj ekskursoj en la urboj Montblanc kaj Sant Sadurni d’Anoia.

La lasta ero de la programo tradicie estis *Opinioj pri la Semajno*. Multaj gratuloj kaj rekomendoj estis notitaj.

Salvador Arago

Internacia Tago de Poezio

La Internacia Tago de Poezio, organizita en Lugano fare de la svisitala PEN-klubo, prezidata de Franca Tiberio, gastigis interalie esperanton: Giorgio Silfer enkondukis itallingve la poemon de Gyula Illyés *Unu frazo pri la tiraneco*, kiu antaŭ precize kvindek jaroj koincidis kun la hungara popolveiĝo kontraŭ stalinismo, kaj sekve deklamis la unuajn dudek versojn de sia esperanto-traduko.

Inter la gastoj de la Internacia Tago estis multaj svisitalaj poetoj, de la juna Daniele Bernardi ĝis la doĵena Giovanni Orelli, kaj kelkaj famaj eksterlandanoj, kiel la portugala Casimiro de Brito, la itala Milli Graffi kaj la slovena Ciril Zlobec, kiu antaŭ kelkaj jaroj estis kandidato al la prezidenteco de la sendependiĝinta Slovenio.

La debato enfokusigis plurajn elementojn pri la nuna rolo de poezio post la eksperimenta sezono de la 1980aj.

HeKo

Kijiv: Varba semajno

La unua Kijiva Esperanto-Semajno (22–29 okt) en la ĉefurbo de Ukrainio pasis sen gastoj, kio kaŭzis ioman modifon de la programo. Tamen la celo de la aranĝo — varbi komencantojn — estis atingita. Okazis priesperantaj prelegoj en la Pedagogia Universitato, Kijivo-Mohiljana Akademio, Instituto de ĵurnalistiko de Nacia universitato Taras Ŝevĉenko, Kijiva politeknika instituto. En la menciitaj universitatoj fare de Mirjam Ruban, Ole Pokotylo, Volodimir Hordijenko estis varbitaj ok novicoj. Ni esperas, ke fine de la kurso en nia Esperanto-klubo *Ora Pordego* aperos novaj membroj.

La sekva Kijiva Esperanto-Semajno okazos 21–28 okt 2007.

Volodimir Hordijenko



Germana-Esperanta ŝildo apud la enirejo de la Domo de la renkontiĝo, kie ofte okazas Esperantaj kunvenoj, prelegoj, seminarioj.

Esperanto-urbo aktivas

Plu aktivas la Germana Esperanto-Centro (GEC), konata ankaŭ kiel Interkultura Centro Herzberg, en Herzberg — oficiala Esperanto-urbo.

GEC kaj Esperanto-Societo Sudharco ricevis ĉi-jaran FAME-kulturpremio de la urbo Aalen (5 mil eŭroj). La urbestro de Herzberg, Gerhard Walter, bonhumore kaj fiere prezentis la laŭdadon en la urba biblioteko de Aalen. La prezidanto de FAME, Herbert Mayer, kaj la prezidanto de la Germana E-Asocio (GEA), Andreas Emmerich, ege laŭdis la konstantan kaj sukcesan aktivadon en Herzberg.

3 okt finiĝis en ICH tutlandaj pedagogiaj tagoj TORPEDO 2 — sukcesa semajnfino kun altnivelaj prelegoj de d-ro Rudolf Fischer, Josef Schiffer, Stefan MacGill kaj aliaj. La ĉeftemo estis: “Lernolibroj kaj taŭgaj instrumentoj”. Estis bone ekhavi novajn sciojn por pli efika instruado, lerni novajn metodojn, didaktikajn elementojn, interŝanĝi spertojn. Dum la seminario okazis ankaŭ pluklerigado de ekzamenantoj kaj ekzamenado. Dek kandidatoj plenumis ekzamenojn de la Germana Esperanto-Instituto laŭ du gradoj (lingva kapableco kaj supera ekzameno), kaj krome naŭ personoj plenumis la bazan kaj meznivelan ekzamenojn de ILEI.

Intertempe, aktivulinoj el Góra denove estis en Herzberg. Ili vizitis novajn E-rilatajn konstruaĵojn en Herzberg, ekz. la Esperanto-arkivon en la subtegmentejo de la malnova urbodomo. Temis ankaŭ pri agadplano por la sekva jaro.

La jubilea 50a GEFA-kongreso (fervojistoj) okazis 6–8 okt en hotelo *Englischer Hof* en Herzberg. Rolf Terjung, la GEFA-prezidanto, estis tre kontenta pri la organizado kun diversaj prelegoj, ekskurso, klasika muziko de la grupo *Trio*, dancmuziko, lotumado, k.a. Partoprenis ankaŭ gastoj el Danlando, Belgio kaj Rumanio.

10 okt en la kavalira salono de kastelo Herzberg estis inaŭgurita jubilea GEA-ekspozicio. Ĝi pretiĝis por la 100-jara datreveno de GEA kaj estis ekspoziciata en Braunschweig dum la jubilea landa kongreso. La urbestro Gerhard Walter faris sian unuan prelegon en Esperanto. La ekspozicio funkciis dum pli ol unu monato. Pli ol mil homoj vizitis ĝin, estis multaj pozitivaj reagoj.

Post la GEFA-kongreso okazis interesa kultursemajno kun konversacado, muziko, rigardado de Esperanto-filmoj, memorado al Joachim Gießner, ktp. La belega vetero allogis al migradoj kaj ekskursoj en la aŭtun-koloriĝanta Harz-montaro.

Ĵurnalistinoj Barbara Pietrzak kaj Gabi Kosiarska komisiite de la pola ministerio por eksterlandaj aferoj venis al Herzberg por intervjui aktivulojn de ICH, la urbestron Gerhard Walter kaj la direktoron de la gimnazio Hans-Joachim Bötzel pri la progreso de Esperanto en la estonta modelurbo. La lokaj kompetentuloj substrekis la gravecon de la Esperanto-instruado.

Kaj dum ĉi tiu kajero de *La Ondo* estas presata, la estraro de ILEI kunsidas en la Esperanto-urbo por plani sian agadon.

Petro, Otto, Zsofia

LTSEC en eŭropa konferenco

Esperanto ĉeestis kun aliaj dudek kvin lingvoj la jaran eŭropan konferencon pri lingvotestado ĉe la universitato de Sofio 8–10 nov 2006. La institucio delegita de la Esperanta Civito, nome KCE, estis reprezentata de prof. Giorgio Silfer. Al la inaŭguro fare de la rektoro estas invitita ankaŭ c-ano Ljubomir Trifonĉovski.

Dum la konferenco estis interalie prezentita LTSEC, la Lingvo Testa Sistema de la Esperanta Civito, la unu sola kiu konformiĝas al la Komuna Eŭropa Referenca Framo, kvankam adaptita al la diaspora transnacia dimensio de Esperantio. KCE kunlaboras kun aliaj institucioj, en Eŭropo kaj Afriko, por la apliko de LTSEC.

La esperanta ĉeesto signifis ankaŭ konkretan kontribuon al du laborgrupoj de prof. Silfer: aparte grava estis tiu pri la rilato inter lingvotestado kaj akiro de ŝtataneco, komisiita de la Konsilio de Eŭropo.

HeKo

Ĉuvaŝio: Nova festivala teamo

15–22 okt en Ĉeboksari (la ĉefurbo de Ĉuvaŝio) okazis la 11a Internacia Lingva Festivalo.

Ĉi-jare dank’ al reprezentantoj de Moskva Asocio de Internaciaj Studentoj oni povas aŭdi melodiojn de afrikaj lingvoj. Gastoj el Ibera Esperantujo, kataluno Carlos Hernández kaj hispano Raŭl Martínez, renovigis intereson al Iberio kaj ties lingvoj, kiun al ĉeboksaranoj inokulis Hèctor Alos i Font en 2004 kaj 2005.

La ĉefa dutaga programo okazis 21–22 okt en la Pedagogia Universitato: estis prezentitaj 42 mondaj lingvoj. Krom ĉeboksaranoj, partoprenis cento da gastoj el Ruslando, Ukrainio kaj Belorusio. La festivalon per koncerto fermis kuba muzikgrupo *Son de Cuba*.

Dum la festivala semajno aktivuloj de Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko (JEAĈR), kunlabore kun aliaj instancoj, organizis mini-festivalojn en aliaj urboj kaj vilaĝoj de Ĉuvaŝio: Ŝumerlja, Novoĉeboksarsk, Jantikovo. Dum la semajno okazis studenta maratono, dum kiu gejunuloj partoprenis interkulturajn konkursojn, ĉe poezia vespero oni aŭdis poemojn en dek kvar lingvoj.

Ĉi-jare la kerno de la organizteamo konsistis el junaj aktivuloj de JEAĈR (Alina kaj Vika Vasiljeva, Katja Zaikina, Alla Ermilova k.a.).

Aleksandra Fedotova

Informado, instruado, utiligado

Dum la semajnfino 7–8 okt 2006 la Sveda Esperanto-Instituto (SEI) aranĝis seminarion en Karlskoga Popola Altlernejo, iama centro por tutsemestraj esperantokursoj fare de Lars Forsman.

La seminario havis kiel temon “Informado, instruado kaj utiligado de Esperanto” kaj ofertis interesajn prelegojn de Radojca Petroviĉ, Sonja Petroviĉ-Lundberg kaj Hokan Lundberg pri, interalie, metodoj por altigi la lingvonivelon inter esperantoparolantoj, pri adaptigo de la ekzamsistemo al tiuj de aliaj eŭropaj lingvoj, pri novaj vojoj atingi homojn pere de Interreto ktp. Okazis ankaŭ viglaj diskutoj inter la publiko.

Vespere Martin Strid gvidis nin tra kelkaj malnovaj svedaj kaj danaj popolkantoj, kiujn li plejparte mem tradukis esperanten. Beatrix Svenenius-Strid kaj Ann-Louise Åkerlund prezentis erojn de la esperanta kulturo en formo de novelo de Sten Johansson kaj fabelo el kolekto de esperanta folkloro (aŭ pli ĝuste dirite “falsloro”).

Sveda Esperanto-Instituto fondiĝis en la jaro 1929. Ĝiaj ĉefaj taskoj, laŭ la statutoj, estas vekti intereson por — kaj stimuli studojn de — Esperanto, kaj aranĝi ekzamenojn. Praktike SEI rolas kiel “ombrela organizo” por la Esperanto-organizoj en Svedio. Ĝiaj membroj estas Sveda Esperanto-Federacio (SEF), Sveda Esperanta Junulara Unuiĝo (SEJU), Sveda Laborista Esperanto-Asocio (SLEA), ILEI.se, Eldona Societo Esperanto kaj la sveda sekcio de KELI.

La plej granda tasko de la Instituto estas ĉiujare aranĝi seminarion pri aktuala temo lige al la celo de la Instituto. Aliaj taskoj estas respondi al demandoj pri rekomendindaj libroj, kolekti lernejarajn laboraĵojn kiuj tuŝas Esperanton, doni konsilojn pri studoj kaj peri kontaktojn kun instruistoj kaj prelegantoj.

Dum la jarkunveno de SEI la partoprenantoj diskutis la rolon kaj la taskojn de la Instituto. La plej gravaj decidoj fariĝis:

1) la Instituto apogu iniciatojn cele al kunlaboro kaj interŝanĝoj de informoj inter la svedaj Esperanto-organizoj

2) la Instituto petu permeson uzi la ekzamen-regulojn de UEA/ILEI kaj, krome, kunlaboru en la laboro adapti la ekzamenojn al la regularo de la Konsilio de Eŭropo.

Ann-Louise Åkerlund

Esperanto-lernejo kun ses seĝoj

Lars Forsman, Siv Sjögren, Anne-Marie Milianowicz kaj Kaisa Hansen sukcese informadis pri Esperanto en la lerneja ekspozicio “Skolforum”, kiu 30 okt – 1 nov en Stokholmo havis 17 mil 152 vizitantojn.

En la Esperanto-budo ni aranĝis “Lernejon kun 6 seĝoj” kaj ĉiuhore Lars Forsman donis etan lecionon. Ĉiuj 6 seĝoj estis ĉiam plenaj, dum la aliaj deĵorantoj disdonis informmaterialon. Ĉar ne estis multaj demandoj kiel “Ĉu esperanto ne estas mortinta?” ni ne devis defendi la lingvon. Ni informis, ekzemple, ke ĝuste nun 15 svedaj bibliotekoj mendis lernolibrojn de Esperanto por gimnazioj.

Ni montris bildludon pri Esperanto, pretigitan de ILEI-se, kaj disdonis al interesitaj lernejestroj kaj lingvoinstruistoj DVD-on *Esperanto Elektronike*. Nia budo estis bone vizitata. Tri vizitantoj gajnis la svedan-Esperantan vortaron — unu el ili estas en la suba foto.

Kaisa Hansen



Ne nur strato, sed ankaŭ haltejo

Kiel estas informite pasintjare, okaze de la 90a UK, la urba konsilantaro de Vilno akceptis proponon de Litova Esperanto-Asocio doni al strato de nova urba regiono Fabijoniškės la nomon Ludoviko Zamenhof.

La decido estis plenumita. Eĉ pli — post konstruo de la nova loĝkvartalo, la itinero de la urba buso №40 “Fabijoniškės-Centras” ekde 23 okt 2006 estas plilongigita tiel, ke la lasta bushaltejo nomiĝas *L.Zamenhofo*.

Nun en Litovio estas tri Zamenhof-stratoj en Vilno, en Kaŭno kaj en Veisiejai. Krome, Esperanto-strato estas en Kazlu Ruda.

Povilas Jegorovas

Okazos kadroŝanĝoj en Litovio

4 nov 2006 en la sidejo de Litova Esperanto-Asocio (Kaŭno, str. Zamenhof, 5) okazis kunsido de la Estraro de LitEA kun partopreno de aliaj asociaj ofichavantoj kaj klubgvidantoj — entute pli ol 20 personoj.

Estis diskutitaj aktualaj demandoj de nuna Esperanto-movado en Litovio: partopreno en diverslandaj internaciaj kaj naciaj Esperanto-aranĝoj, ejoj por la asocia filio en Vilno, eldona agado, *Litova stelo*, 42a kongreso de LitEA, Zamenhof-Tagoj 2006, Esperanto-Domo en Kaŭno, financo, retejo, kluba agado, BET-43, kunlaboro kun litovia UNESCO-komisiono, instruado de Esperanto en Litovio, partopreno en librofoiroj kaj en sciencaj konferencoj, informado pri Esperanto k.m.a.

Ĉar Aida Čižikaitė ekde komenco de 2007 ne plu funkcias kiel sekretariino de LitEA en Kaŭno, estis anoncita konkurso por tiu posteno. Povilas Jegorovas anoncis, ke post fino de la prezidanta oficperiodo fine de 2008 li ne plu kandidatiĝos por tiu posteno.

Povilas Jegorovas

En du litoviaj universitatoj

Daŭras Esperanto-instruado en Kaŭna humanisma fakultato de la Vilna universitato. La kurson de la unua grado en ĉi tiu lernojaro frekventas 22 studentoj. La kurson de la dua grado frekventas 7 studentoj. Ĉiu grado (du semestroj) enhavas po 64 akademiajn horojn (po 32 horojn dum unu semestro). Do, okazas unu prelego dum semajno. Esperanto estas libere elektebla studobjekto, kiun povas elekti studentoj de ajna specialeco. La kurso valoras du studunuojn. Fine de la semestro okazas ekzameno. La kurson gvidas sekretariino de Litova Esperanto-Asocio Aida Čižikaitė.

Ankaŭ ĉi-jare en universitato de Šiauliai oficiale funkcias kurso de Esperanto, kiun rajtas elekti kaj studi kiel elekteblan studobjekton studentoj de ajna fakultato de ajna studjaro. Ĝin gvidas konata urba aktivulo Zenonas Sabalys. La kurso komenciĝis 12 sep 2006, la lecionoj okazas ĉiumarde kaj tiel daŭros dum la tuta semestro. Dume ĝin vizitas 10 studentoj, sed estonte kvanto da kursanoj povos pliiĝi. La fino de la kurso estos enkalkulata en “kreditoj” de studentoj. La kurso estis anoncita per diversaj universitataj informiloj.

Povilas Jegorovas

La dek-tria por la Granda Rio

Ĉe Centro Lassalista de Estudos en la urbo Niterói la antaŭlastan oktobran dimanĉon okazis la 13a Esperanto-Renkontiĝo de la Granda Rio.

Okdek personoj ĉeestis en la evento, kiu komenciĝis per komuna kantado de la brazila nacia himno. Sekvis prelego de Walter Fontes pri la centjariĝo de Esperanto en Niterói, kun samtempa interpretado de Jair Salles. Post mallonga paŭzo okazis arta programo — deklamadoj kaj muzikprezentadoj sub la kunordigo de Neide Barros Rêgo.

Posttagmeze parto de la ĉeestantaro sekvis prelegon de Paulo Sergio Viana “Psiko-memhela literaturo: utila, senutila aŭ malutila?”, dum aliaj ĉeestis Esperanto-kurson de Jair Salles. Sekvis prezento de la okazonta 42-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj aŭkcio, lerte gvidita de Alfredo Aragon.

La renkontiĝo finiĝis per komuna kantado de ILa Espero.

Aloísio Sartorato

Spiritista renkontiĝo

“Tre agrabla surprizo”, — jen la ĉefa opinio de ĉirkaŭ 120 partoprenantoj de la 5a Spiritista Esperantista Renkontiĝo, okazinta 10 sep en Rio-de-Ĵanejro.

Profesoro Josefo Pasini, la aŭtoro de la portugallingva libro *Dulingvismo-Utopio aŭ Anti-Babelo*, estis invitita por paroli pri “La Misio de Esperanto en la Tria Jarmilo”.

Aleksandro Sankoro komencis la artan programon per belaj kantoj pri paco kaj interkompreniĝo — unuafoje li kantis Esperante kune kun la entuziasma ĉeestantaro.

Sekvis *La Frenza Sciencisto* — teatraĵo pri sciencisto, kiu konstruis humanecan roboton kaj provis konvinki la edzinon ke la metala monstro estos utila hejme.

Flutisto Felipe Kastro unue ludis sole kaj poste li akompanis la lernejan koruson, kiu prezentis la kanton *Dependas de ni*. Antaŭ la kantado de *La Espero*, la grupo omaĝis per poemo al Altivo Pamphiro, eksprezidanto de la Spiritisma Domo *Leon Denis*, kiu elkarniĝis en februaro.

Ĉiuj kantoj kaj la poemo estis montritaj sur ekrano dulingve, ĉar en la publiko estis neesperantistoj kaj komencantoj. Eĉ la teatraĵo estis prezentita dufoje, unue Esperante kaj poste portugale.

Djalma Da Cuhna Pessata

Aleksandro Sankoro kantas en SER-5 →

Babelo estu detruita!

Kolekto *Que Babel soit Détruite!* (Babelo estu Detruita!) de James Rezende Piton, ĉefdelegito de UEA por Brazilo, ricevis la “grandoromitan arĝentan medalon” en la brazila-portugala filatela ekspozicio Lubrapex (Rio-de-Ĵanejro, 30 okt – 5 nov 2006).

La premiita kolekto, prilaborita dum pli ol 15 jaroj, priskribas per filatelaj kaj poŝthistoriaj dokumentoj la mondan lingvan problemon, solvojn proponitajn, kaj la strukturon, kulturon, historion kaj movadon de la lingvo Esperanto. Plurcent filatelaĵoj dense prezentiĝas sur la laŭregulaj 80 folioj.

Inter la filatelaĵoj de *Babelo* estas pluraj raraj dokumentoj, ekzemple, poŝtkarto eldonita dum la Unua mondmilito kun reklamo pri la valoro kaj utilo de Esperanto por germanaj soldatoj. Aŭ ekzemplero de perado de informo pri civiluloj en alia lando, organizita de UEA kunlabore kun Ruĝa Kruco dum tiu mondmilito. Same interesa estas unu el la malmultaj konataj ekzempleroj de la poŝta stampo, kiu devus funkciigi dum la 10a Universala Kongreso en Parizo, kie poŝta ĝiĉeto funkciis nur kelkajn horojn antaŭ la malfermo kaj estis nuligita same kiel la kongreso pro la eksplodo de la milito. Elokventas letero, rifuzita de la poŝta trafiko en Germanio per oficiala stampo, kiu tekstas, ke Esperanto estis kialo por malpermesi korespondaĵon en 1940.

La “grandoromita arĝento” ebligas al la kolekto aliĝi al mondaj ekspozicioj dum kvin jaroj, kaj tuj post la fermo de Lubrapex la kolekto de Piton estis sendita al Bruselo, kie ĝi partoprenos en la monda filatela ekspozicio.

Aloísio Sartorato



Skota Studrondo

La bela mezepoka placo kiu ĉirkaŭas la katedralon de Dunblane, frontantan al Scottish Churches House (Domo de la skotaj Eklezioj), pitoreskas sufiĉe por allogi homojn al la ĉiujara evento. En vico da antikvaj domoj estas trinkejo *The Tappit Hen* (La Kresta Kruĉo), kie kune sensoifiĝis prelegintoj kaj aŭskultintoj post longa tago de parolado en la Skota Studrondo de 30 sep ĝis 1 okt 2006. Tio ankaŭ allogas! Sed ja allogaj estis la programoj kaj distraj kaj informaj.

Tom Neil prelegis pri la skota poeto William Soutar. Soutar suferis dum la plej granda parto de sia vivo pro spondilito kiu malebligis al li laboron. Li tamen neniam plendis pri la doloro kiun la malsano kaŭzis al li ĉar ĝi liberigis lin por dumviva verkado. Tom laŭtleĝis poemon de Soutar kiun William Auld brile tradukis en Esperanton.

Jack Casey parolis pri biografio de Alan Wicker, raportisto pri ekzotikaj lokoj en la mondo. Wicker prezentadis dum multaj jaroj la tre popularan *Wicker's World* (La Mondo de Wicker). En la biografio Wicker priskribis siajn spertojn kiel militfilmisto dum la dua mondmilito.

Andreo Weir parolis pri sia unua UK en Florenco. Estis ĝinde revivi per la vortoj de juna Esperantisto niajn proprajn spertojn unue eniri la esperantan mondon. Andreo diris ke, jes, li scias ke Esperanto funkcias inter *britaj* Esperantistoj sed ĉu ĝi ja povas ĉe alilandaj? Ĉu li estos komprenata? Ĉu la aliaj tro rapide parolos? Kaj lia malkovro? Surprize ĉu ne, ĝi ja funkcias!!

Ed Robertson distris nin per belegaj bildoj kaj rakontoj pri sia vizito al Hindio.

Duncan Thomson regalis nin per kvizo. Ni dividiĝis en kvar teamojn, ĉiu ĉirkaŭ propra tablo kun glasoj da vino. La kvizo estis pri Esperanto, ĝia kulturo kaj historio. Nu, ĉu la vino helpis pensadon aŭ helpis konfuzon, neniuj scias. Ĝi eble estis pretigo por tiuj kiuj iris al la trinkejo, aŭ helpilo por tiuj kiuj restis endome kaj dormis anĝele.

Dimanĉe ni ekskursis al la Palaco de Scone, la domo de la Grafo de Mansfield. Oni konservis en ĝi, interalie, la dormĉambbron de reĝino Victoria, kiun ŝi uzis dum vizitoj, kaj la plej longan ĉambbron en Skotlando kie ŝi ludis kurlingon sur polurita planko! En la ĝardeno estas la antikva loko por la kronado de la skotaj reĝoj.

Hju Rid

AKEL: la tria renkontiĝo

La tria renkontiĝo inter la partneroj de la projekto “Alternativa komunikado inter Eŭropaj Lernejoj por konstruado de mondkoncepto de la junaj homoj en estonta Unuiĝinta Eŭropo”, financata de la internacia agentejo *Sokrates*, okazis 15–22 okt 2006 en Gloucester, Britio.

En ĉi tiu bela urbo kuniĝis geinstruistoj kaj gelernantoj el kvar lernejoj: lernejo “Canko Cerkowski” (Polski Trambesh, Bulgario), Scuola media statale “Cavour” (Modena, Italio), “IES Reyes Catolicos” (Ejea de los Caballeros, Hispanio) kaj kompreneble la ĉarmaj dommastroj de “Sir Thomas Rich’s School” (Gloucester, Britio).

La temo de la renkontiĝo estis “Bonaj praktikoj kaj tendencoj en la uzado de la novaj informteknologioj en la instruado. La neceso de la instruado kaj lernado de Esperanto kaj de aliaj fremdaj lingvoj”.

La partneraj lernejoj demonstris multmedian prezentadon laŭ la temo. Dank’ al tiuj prezentadoj ni konatiĝis kun la maniero laŭ kiu la gelernantoj kaj la geinstruistoj laboras en siaj lernejoj. Ni vidis la multmediajn laborojn, kiujn la gelernantoj preparas por variigi siajn lerneajn okupojn.

Inter ni mem ni ne havis komunik-problemon, ĉar ĉiuj parolis en unu sama lingvo — la lingvo de la amikeco Esperanto. Ni denove spertis kiom agrabla kaj utila estas komunikado en unu lingvo neŭtrala, kiu ne metas barojn kaj donas eblecon por senproblema diro de ĉiuj pensoj, sentoj kaj deziroj.

En Gloucester ni trarigardis la belegan katedralon en kiu estis farita parto de la filmo pri Harry Potter, ni konatiĝis kun la urbeŝtrino kaj kun la ŝerifo, kiuj akceptis nin en sia laborloko, vestitaj per siaj belegaj oficialaj kostumoj. Ni vizitis ankaŭ Oksfordon kaj Londonon. Dum la ekskursoj ni pli bone ekkonis unu la aliajn, profundigis la jam ekzistantajn amikecajn rilatojn kaj komencis novajn.

Dum la tuta laborrenkontiĝo ni pridiskutis tion, kion ni faris ĝis nun kaj planis la agadojn por la estonteco. Ĝis la sekvonta renkontiĝo (aprilo 2007 en Polski Trambesh) en ĉiu lernejo oni anoncos konkurson por eseo “Mia eŭropa civitaneco”, ĉie estos organizitaj fotoekspozicioj “Mi loĝas en Eŭropo”, kaj estos kolektata materialo pri “Kutimoj kaj tradicioj, aŭ kiamaniere festas mia popolo”.

Mariana Gencheva



AKELanoj lernas en Britio

Unuafoje el la kroata bengalen

Kroata Esperanto-Ligo (KEL) kun Barata Ambasadego en Zagrebo lanĉis 14 nov 2006 en Centro pri infanaj libroj la bengalan tradukon de kroata infanlibro *Mirindaj aventuroj de meti-lernanto Hlapić* en la traduko de Probal Dashgupta. Dashgupta tradukis ĝin el la Esperanto-traduko de Maja Tišljar. La libro jam aperis, tradukite el Esperanto, en la japana traduko de Sekoguchi Ken (2004 kaj 2005) kaj la persa de Achtar Etemadi (2005). Konsilanto en la ambasadejo V. Mahalingam akcentis gravecon de Esperanto por la monda komunikado kaj nomis la kulturan kunlaboron pri tiu libro modela, aldonante ke la ambasadejo estas je la dispono por ke la libro aperu ankaŭ en aliaj lingvoj de Hinda Unio.

Profesoro de Hindia fakto de Filozofia Fakultato Ivan Andrijević prezentis la bengalan lingvon kaj emfazis, ke al esperantistoj la kroata kulturo dankas la unuan tradukon de la kroata al la bengala lingvo. Infanoj legis ĉapitrojn el la libro en la kroata kaj Esperanta traduko kaj Sulekha Pollak legis ĉapitron en la bengala. Post la prezento estis servita manĝaĵo el la kulturo al kiu estis tradukita la libro. Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj sendis gratulleteron al Kroata Esperanto-Ligo. Du televidaj elsendoj, du radiaj programoj (kultura kaj infana) kaj pluraj artikoloj rezultis el la programo de la libroprezentado.

Novajagentejo HINA elsendis informon pri la traduko kaj ĝi estis vaste diskonigita tra la lando kaj la informo aperis eĉ sur la titolpaĝo de senpage distribuata gazeto *Metro*.

Spomenka Štimec

En la ĉeĥa paradizo

Vere kiel en paradizo pasis 16–22 okt 2006 en la Ĉeĥa paradizo Skokovy en la pensiono *Espero* tradicia lingva seminario.

Ni multe travivis kaj multe laboris. La etoso amika kaj agrabla regis dum la tuta tempo ekde la interkona vespero, kiam ni konatiĝis kun novaj homoj.

Instruado okazis en tri grupoj, kaj instruistoj estis severaj, sed la suno post tagmanĝo malavare brilis. Oni povis fabriki al si kristnaskajn ornamajojn antaŭ vespermanĝo. Partoprenintoj rakontis pri la konferenco de ĈEA kaj pri UK en Florenco. Ni povis konatiĝi kun DVD *Esperanto Elektronike*, farita de E@i, kaj kun minikurso por neesperantistoj de Mira Vanik kaj Dáša Chvátalová. Ni diskutis, laŭdis kaj kritikis. La minikurso (50 minutoj) estos prezentita en Prago kadre de la 16a lingvofoiro *Expolingua* kaj poste ankaŭ en Berlino. Pro konstanta ŝanĝiĝado de partoprenantoj ni aranĝis du amuzajn vesperetojn kun malsamaj dignaj programoj.

Nia duontaga ekskurso daŭris neku-time longe, ĉar post vizito de la kastelo Sychrov ni pasigis interese tempon kun falkisto kaj lia rabbirdaro, kaj post la vespermanĝo kaj mallumiĝo en lerneja stelobservejo ni povis partopreni prelegon kaj observadon, ĉar la ĉielo estis sennuba kaj ankaŭ ĉirkaŭrigardo al la urbo estis bela.

Jindřiška Drahotová

**Ne forgesu
reaboni!**

Esperantolando centjara

Amikejo, iama esperanto-lando sur la teritorio de Neŭtral-Moresnet, fondiĝis sekve de grava renkontiĝo inter la d-ro Molly, kuracisto de la tiea zink-entrepreno *Vieille Montagne* kaj dua urbestro de Moresnet, kaj la franca esperantisto profesoro Roy.

La esperantista asocio *Senlime*, kiu regule kunvenas en Kelmis (iama *Amikejo*, nun en Belgio) okazigis 15 okt 2006 en la kulturcentro *Select* festadon de la centjariĝo de ĉi tiu unika teritorio, kiun partoprenis esperantistoj kaj ĵurnalistoj, kiuj poste aperigis artikolojn en almenaŭ tri gazetoj.

Post bonveniga kafo kaj salut-vortoj de Mathieu Schrymecker, loka organizanto, kaj Marcel Delforge, reprezentanto de Asocio Por Esperanto, Klaus Hogen ludis la esperantistan himnon. Sekvis teatra spektaklo pri la historia renkontiĝo, okazinta antaŭ cent jaroj.

Mathieu Schrymecker malfermis riĉan ekspozicion kun interesaj tekstoj kaj fotoj pri *Amikejo*.

Post oficiala senvualigo de portretoj de Molly kaj Roy, donacotaj al la loka muzeo, kaj porokaza ĉampano, okazis bankedo afable kaj talente servita de la nova teamo de la kulturcentro *Select*, kie regule okazas la nunaj kunvenoj de *Senlime*, kaj kiu ankaŭ iam estis kulturcentro kaj teatrejo de *Amikejo*.

Sekvis promenado tra la iama Moresnet al la protestanta tombejo kie ripozas d-ro Molly, kaj al la domo Jansmühle, kie okazis la grava renkontiĝo.

J-M. Jacques

Eklaboru!

15 nov, je la kvinjara datreveno de la Vikipedio en Esperanto, nova retrojekto lanĉiĝis, kiu eble estos same grava por la Esperanto-movado: la retejo *Eklaboru*, kie ĉiu povos trovi laboron aŭ laboranton per Esperanto, por praktike uzi nian lingvon.

Nuntempe ekzistas multaj eblecoj labori per Esperanto, ĉar oni ne plu devas esti surloke. Ekzemple, germano povus dungi programiston kiu loĝas en Ruslando kaj li laborus rete. Tio estas avantaĝo ĉar lia salajro estus malpli alta ol tiu de germana programisto ekzemple, sed ankaŭ estus avantaĝo por li, ĉar la salajro ja estus pli alta ol normala ruslanda salajro. *Eklaboru* tamen ankaŭ faciligas dungi homon por labori loke, ekzemple, kiel vartisto kiu instruos Esperanton al infanoj. Tiel gejunuloj povas plibonigi ilian lingvonkonon kaj sperti alian landon.

Tio estas gravega paŝo por Esperanto ĉar laboro ja estas grandega parto de la homa vivo kaj ĝis nun ĝi estis eble la unika parto kiun oni ne povis fari en Esperanto. Se oni volis dungi esperantiston antaŭe, oni devis havi bonegajn kontaktojn ene de la movado por trovi eĉ nur unu taŭgan kandidaton. Tio ne nur estas temp-malŝpara sed ankaŭ neprofesia kaj malallogas neesperantistojn. Nun per *Eklaboru* ĉiu povas interkonatiĝi kaj trovi laboron aŭ laboranton — do vizitu www.eklaboru.com, kontribuu kaj ankaŭ informu viajn amikojn!

Chuck Smith

Bonan apetiton!

Infanoj de la elementa lernejo *Retkovec* en Kroatio, kiuj ĉeestis ĉi-jare la Infanan Kongreseton en Prato, organizis en sia lernejo kuiradon por montri, kion ili spertis dum IJK.

Instruistino Judita Rey Hudeček informis pri tio al la kroata TV, kaj tiu planis ses programojn dum kiuj la infanoj kuiras internacie per Esperanto. Estis filmitaj programoj pri la itala, israela, bengala, bolivia kaj ĉina manĝoj kaj aldone kun la naskiĝtaga kuko.

La ĉefkuirista knabo portis kuiristan ĉapon kun subskribo “Esperanto-Kuirejo”. Sur la tabulo troviĝis koncerna recepto en la kroata kaj Esperanto.

La unua ero estis montrita 13 nov kadre de la kroata TV-programo “Hrvatska, dobro jutro” (Bonan matenon, Kroatio).

Spomenka Štimec

TILE-2 ĉe la Nigra Maro

La duaj Tagoj de Internacia Lingvo Esperanto (TILE-2) okazis 27–29 okt en la nigramara ruslanda urbo Soĉi.

Je la malfermo de TILE infanoj, sukcese partoprenintaj ĉi-jare konkurson de infanaj desegnaĵoj en Francio, ricevis diplomojn kaj lernolibrojn de Esperanto. En la programo de la Tagoj estis ankaŭ kantkoncerto de Sergej Sergejeff, primovada diskuto, renkontiĝo kun esperantologo Aleksandr Melnikov, ekskurso al la Arbo de Amikeco...

La tagĵurnalo *Ĉernomorskaja Zdravnica* aperigis artikolon kaj foton pri la renkontiĝo.

Vladimir Bupalov

La deka GRUPE

70 geesperantistoj el Pollando, Hispanio, Ĉinio, Senegal, Nierio, Bulgario, Ĉeĥio, Slovakio kaj Germanio kunvenis 11–12 nov 2006 okaze de la 10a GRUPE en Gliwice. La solenan malfermon partoprenis vicurbestro Andrzej Karasiński kaj direktoro de la aranĝejo Andrzej Gilner. Oni transdonis salutvortojn de ĉiujn landoj el kiuj venis reprezentantoj.

La programo enhavis diversstemiajn prelegojn, prezentadon de Karaoke-kantoludoj en Esperanto, renkontiĝon kun la ĉefredaktoro de la revuo *Esperanto* Stano Marček kaj Kristnaskajn kantojn de Anna Osmakowicz.

Komuna vespermanĝado kaj festado en tranoktejo finis la agrablajn tagojn.

Andrzej Sochacki

GRUPE estas Glivicea Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto. Tiaj uzantoj ja estas Alicja Lewanderska-Quedenau, Xiao Xiao kaj Stano Marček, kiuj ĉi-jare trovis komunajn praktikajn temojn en Glivice (*Fotis Andrzej Sochacki*)





Oni denove lernas Esperanton en la plej granda urbo ĉe Bajkalo

28 okt en Irkutsk (urbo apud Bajkalo, en Siberio) surbaze de lingvocentro ABC okazis prelego pri Esperanto, kaj post unu semajno, startis trimonata baza kurso de Konstantin Hlyzov (Kostik Vento).

La kurso estas pagata, ĉar ABC estas privata komerca lingvolernejo, kiun gvidas Sergej Rasputin — filo de fama verkisto Valentin Rasputin. Nun la kurson frekventas kvar personoj, kaj estas dezirantoj lerni la lingvon aŭto-

didakte. Anoncetone pri la kurso aperigis loka distra magazino *Afiŝa*, kiu komence de decembro publikigos grandan artikolon pri Esperanto kaj intervjuon kun la kursgvidanto.

Antaŭe Esperanto-kursojn en Irkutsk gvidis Eŭgeno Delcov en sia hejmo. Eŭgeno, kiu denove loĝas en sia naskiĝurbo Ulan-Ude, promesis baldaŭ rakonti pri siaj sukcesoj en disvastigado de Esperanto en Irkutsk.

Konstantin Hlyzov

Ĉiuj gepatroj petis, ke oni vipu nelernemajn infanojn en IZO

14 okt 2006 la klasĉambro de Instituto Zamenhof (Togolando) ne povis enteni ĉiujn gepatrojn por preparoli la laborojn de IZO. Kvankam multaj restis sur balkono, ili intervenis en la traktado. Kvankam ne aperis konkreta respondo pri starigo de triagrada nivelo en IZO, la gepatroj estis kontentaj pri la funkciado de la lernejo.

Aplaŭdoj abundis ĉe la anonco de la pasint-jara rezulto. La interveno de la gepatroj koncernis mankon de loko, pro kiu IZO ne povas akceptu pliajn gefilojn iliajn.

Oni parolis ankaŭ pri premiado kaj sankcioj. Ekde la kolonia periodo en togolandaj lernejoj instaligis batado de gelernantoj, kiuj ne diligentas. La batado iĝis tiom ĉiutaga, ke sen ĝi nun oni havas la impreson, ke ĉio ajn estas permesata al ĉiuj en IZO. Ĉiuj gepatroj petis, ke oni vipu nelernemajn infanojn, ĉar ili kutimiĝis al tio en aliaj lernejoj kaj eĉ ne volas lerni lecionojn sen puno. Necesis konkludi tiun ĉi traktadon, kaj tiam decidiĝis, ke oni iom post iom forlasas la bastonon profite al premiado kaj aliaj punoj, kiuj helpas al la punatoj lerni nesuferante.

La gepatroj scias, ke la lernokotizo en IZO estas pli malalta ol en la aliaj lernejoj. Tamen ili petas, ke oni helpu ilin pagi. Necesas, ke gepatroj, kiuj ne havas la eblecon pagi lernokotizon, rilatu kun la direkcio de la Instituto.

Estis preparolita la organizado de la laboro, ke la rezultoj en tiu ĉi jaro estu pli bonaj ol en la pasinta. Ekde novembro okazos frumatenaĵoj kaj vesperaj kursoj por la gelernantoj, kiuj havas ŝtatan ekzamenon fine de la jaro. Apartaj instruistoj estas dungataj por tio. Ekslernantoj de IZO tagmeze vizitos la lernejon por labori kun gelernantoj dezirantaj tion.

Devus okazi elekto de nova estraro de la asocio de la gepatroj. La kunvenantoj prokrastis tion, ĉar, laŭ ili, la laboroj en la pasinta jaro estis tiom bonaj, ke la nuna estraro plulaboru.

Ne estas prisilentita la manko de klasĉambroj por la elementa nivelo. Klarigoj pri metado de du klasoj en unu solan ĉambron kun unu instruisto estas donitaj. Tio estas nur provizora klopodo ĝis solvo por konstrui pliajn klasĉambrojn estu trovita.

Gbeglo Koffi

Unufraze

★ Dek mil kalendaroj kun koncizaj informoj pri Eo disdonis aktivuloj de JEFO (junuloj) en la Homara Festo de la franca komunista gazeto *L'Humanité* (15-17 sep); E-budon kunlabore okazigis aktivuloj de FET (komunistoj), SAT-Amikaro k JEFO. (*La Sago*)

★ 27 okt en populara franca radiostacio *Europe 1* ĵurnalisto Marina Carrère d'Encausse rakontis pri Zamenhof k pri Eo en la programo *Santé & Bien-être* (Henri Masson)

★ E-societo Marko Nešić (Novi Sad) aliĝis al Kunordiga Komitato pri lingvoj, literaturo k kulturo de Vojvodino, kadre de Vojvodina Kultur-Instituto. (Landa Agado)

★ 12-persona grupo da aktivuloj de Teorio de Feliĉo (PORTOS) 4 nov 2006 partoprenis en Moskvo la opozician *Rusan Marŝon 2006* sub trikolora standardo kun verda stelo k skribaĵoj en Eo. (REU-agado)

★ Okaze de la Ago-Tago studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo k Kulturo en Bydgoszcz (Pollando) repentis k riparas la memortabulon dediĉitan al Zamenhof en la placo samnoma. (Augusto Casquero)

★ E-lingvaj iridoj *Juna somero*, *Amoenido*, *Arilido* k hemerokaloj *Simple alta*, *Simple brilanta*, *Simple delikata*, *Simple origita*, *Simple melona*, *Simple promesa*, *Simple sunflava*, *Simple unua* kreskis ankaŭ ĉi-somere en la ĝardenoj de la slovena fakulo pri iridoj Ignac Golob. (*Tempo*)

★ 20 okt en Erevano estis fondita Armena Kultur-Kleriga Centro *Espero*, kiu okupiĝos pri disvastigo de E-kulturo, organizado de E-aranĝoj, evoluigo de interkulturaj kontaktoj, lingvoinstruado, tradukado k.a. (Karine Arakeljan)

★ Aperis ĉe KAVA-PECH la unua eldono de la Biblio, novelitorita fare de Ekumena Komisiono de IKUE k KELI sub la gvido de B. Eichkorn k A. Kronenberger; ĝi enhavas la Malnovan Testamenton en la traduko de Zamenhof kun la Duakanonaj Librojn en la traduko de Berveling k la Novan Testamenton en la traduko de la Brita Komitato. (Petro Chrdele)

★ Internacia Klubo *Esperantotur* okazigis du alikontinentajn vojaĝojn: Kalifornio-Usono-Kanado-Alasko en septembro k Usono-Havajo-Japanio-Koreio-Ĉinio-Tibeto en oktobro. (Esperantotur)

★ 27 okt estis dissendita la 500a numero de *Nova Sento in Rete* — itala retinformilo, lanĉita en 1997 k ricevata de pli ol 2 mil 600 e-istoj k simpatiantoj. (*Informitale*)



Kvankam slovako Ján Figel' estas amiko de George Bush, li ne subtenas nuranglan politikon en EU.

Multlingvismo: Eŭropa Parlamento debatas minoritatajn lingvojn

(**Vide el Bruselo**) Per 537 voĉdonoj por, 50 kontraŭ kaj 59 sindetenoj, la Eŭropa Parlamento adoptis Novan Kadrostrategion por Multlingvismo laŭ raporto de kataluna deputito Bernat Joan i Mari. La raporto A6-0372/2006 esploris la novan strategion de la Komisiono rilate al plurlingvismo kaj diverseco, valoroj, kiuj teorie devas gvidi la tutan agadon de la Eŭropa Unio.

Joan i Mari parolis pri tri grupoj de lingvoj. Unue, plene oficialaj lingvoj. Due, malplimult-ig-itaj lingvoj, kiuj ne estas plene oficialaj kaj kiujn oni ne rajtas uzi en ĉiuj situacioj de la normala vivo, speciale kun la ŝtato, eĉ se ili estas la ĉefaj lingvoj en siaj specifaj lingvo-komunumoj. Trie, minoritataj lingvoj, kiuj estas sub la premo de alia(j) lingvo(j), eĉ en siaj komunumoj.

“Ĉiuj grupoj de lingvoj devas esti respektataj kaj subtenataj. La subtenado de lingva diverseco estas unu el la celoj de la eŭropaj instancoj”, — diris Joan i Mari. Li parolis angle, ĉefe pro tio ke li ne rajtas uzi sian denaskan katalunan lingvon.

“Multaj eŭropaj civitanoj havas nur unu lingvon, kutime sian gepatran lingvon, kaj unu el la ĉefaj celoj de la Eŭropa Unio estas havi civitanojn kiuj kapablas paroli plurajn lingvojn”. Gravas, laŭ Joan i Mari, ŝanĝi pensmanierojn rilate al lingvoj. “Plejparto de eŭropaj ŝtatoj estas oficiale unulingvaj. Tio ne estas vera respiegulo de la faktoj”, — aldonis Joan i Mari.

La kataluno, parolante en la Parlamento 15 nov, alvokis al vere eŭropa lingva politiko. “Tia politiko promociu multlingvismon, plibonigu la lingvajn konojn de la civitanoj en la Eŭropa Unio. Pro tio la eŭropaj buĝeto kaj programoj devas subteni ne nur la ĉefajn lingvojn, sed ĉiujn lingvojn, kaj tiel plibonigi diversecon. Ĉiu lingvo estas bona por la homaro”, — daŭrigis Joan i Mari.

“Ni ĉiuj volas vidi multlingvan eŭropan socion, en kiu la multlingvismo de unuopuloj daŭre kresku, ĝis ĉiuj civitanoj havu praktikajn konojn de almenaŭ du lingvoj aldone al sia gepatra lingvo. Tio estas la fama formulo, *gepatra lingvo plus du*, interkonsentita de EU-ĉefoj en Barcelono en 2002”, — diris la slovaka membro de la Eŭropa Komisiono Ján Figel'.

Figel' antaŭnelonge starigis Altnivelan Laborgrupon pri Multlingvismo por ankoraŭ pli preparoli kaj diskuti. Li

volas ankaŭ certigi pli efikan lingvolernadon en infanĝardenoj kaj antaŭ-lernejoj.

Tamen Figel' kredas je kelkaj principoj, kiuj fermus la pordon al financado de Esperanto-projektoj, almenaŭ lingvaj projektoj: “Lingvoj kiel ero de kulturo, ne nur kiel teknika ilo, sed kiel vere grava portilo de heredaĵo, kiel kultura fenomeno, meritas respekton kaj agnoskon”.

Figel', kiu plutenos la pli gravajn dosierojn “edukado”, baldaŭ forlasos la lingvan dosieron. Lia posteulo, Leonard Orban, verŝajne uzos tiujn vortojn ekde 2007 por rifuzi Esperanto-projektojn kadre de la Nova Kadrostrategio por Multlingvismo.

Seán Ó Neachtain, unu el tri parlamentaj parolantoj de la nova oficiala lingvo, la irlandano, kontentas pri la raporto de Joan i Mari. “Mi ne parolos mian gepatran irlandan lingvon ĉi-vespere. Tamen komence de la venonta jaro mi rajtos fari tion danke al la apogo de la parlamentaj servoj”, — diris Ó Neachtain.

Kataluna dekstrulo Alejo Vidal-Quadras, kiu tamen voĉdonis kontraŭ la kataluna kiel oficiala lingvo en la Parlamento, kritikis la naciismon de la raporto-skribanto Joan i Mari: “La respekto al la diverseco estas principo de la Unio, sed uzado de la lingvoj por disigi la membro-ŝtatojn sur bazo de la etnoj kaj lingvoj estas kontraŭseno, kontraŭ kiu la Popola Grupo [hispanaj dekstruloj. — DAI] ĉiam batalas per ĉiuj niaj fortoj”.

Dank al la apogo de la eŭropa popolpartio, Vidal-Quadras kapablis “kastri” la tekston. Lia portugala sampartiano Vasco Graça Moura kontentas pri la fina teksto: “Sekvi laŭlitere la principon de la lingva egaleco haltigus la funkciadon de la institucioj de EU. Aldone, oni devas eviti esti uzita por celoj kiuj kondukas al naciismo rilate al demandoj de tiel-nomataj minoritataj lingvoj”.

Laŭ Graça Moura, oni devas aldoni lian gepatran lingvon al la listo de “gravaj” lingvoj, uzataj en la eŭropa “mezurilo de lingva kapablo” (nuntempe nur kapablo de la angla, franca, germana, hispana kaj itala estas ekzamenita) “La portugala estas la tria eŭropa lingvo plej parolata en la mondo, post la angla kaj hispana, kaj antaŭ la germana”, — diris Graça Moura.

Dafydd ab Iago

Reago de leganto

Mi estas ŝokita pri la sinteno de la samideano, kiu riproĉas vin pro la prezaltiĝo. Estas memkompreneble, ke vi bezonas vivteni vin per la profito el via eldonejo; alikaze, ĝi ne povus ekzisti. Oni devas eĉ laŭdi vin, ĉar vi faras tiun laboron kontraŭ malgranda enspezo. Eble vi povus gajni multe pli da mono, se laborus ion alian.

Tiaj homoj, kiel la samideano, kiu insultis vin, estas bedaŭrinde ne malmultaj en nia movado. Mi demandas min, de kiu li forrabas sian monon. Verŝajne li havas tre komfortan postenon sen iu ajn risko de maldungiĝo, supozeble ĉe la ŝtato aŭ simile, ĉar li tute ne kapablas kompreni la fragilan situacion de entreprenisto. Sed li forgesas, ke ĉiu abonanto abonas libervole, dum la impostojn, el kiuj li vivtenas sin supozeble, ni pagas devige. Kiu do estas rabisto? Aldone, sub la influo de malnovaj ideologioj, li rifuzas kompreni, kiun valoron havas la laboro de firmaestro. Tiel pariĝas stulteco kaj envio. Ke li estas movadgravulo, eĉ malplibonigas la situacion.

Andreas Emmerich

Malserena aŭtuno en Esperantujo

La Ondo petis profesoron Giorgio Silfer, kiu estas aktiva kaj en la kultura (literaturo, recenzado, revuo, teatro, rendezuoj, PEN, instigado ktp) kaj en la socia (Esperanta Civito) sferoj en Esperantujo, esprimi analizan opinion pri la tri aŭtunaj estingiĝoj, kiuj sekvis la forpason de Auld: *Ĝangalo*, *Fonto*, Esperanto-redakcio de Radio Polonia.

LOdE: La unua demando: ĉu estas hazarda koincido aŭ subita krizo de tuta sistemo?

GS: Nek la unua nek la dua. Sed permesu aldoni al via listo la agonion de SAT, la morton de *Rok-Gazet'*, la pereon de la naturamika movado. Ĉio ĉi komenciĝis jam antaŭ la forpaso de la karmemora Bill Auld. La tuta jaro 2006a prezentas tre malfacilan kadron por la malnova Esperantio. Kaj ne temas pri konjunktura krizo.

LOdE: Vi parolas pri “malnova Esperantio”. Mi eble konsentus pri SAT kaj Radio Polonia, sed kio pri *Ĝangalo*? Ĉu la unua portalo en Esperanto, ligita al la unua interreta televido, apartenis al la pasinteco? Kaj ĉu *Rok-Gazet'* estis maljunula entrepreno?

GS: *Ĝangalo*, kiel cetera ankaŭ Radio Polonia, situas (ilia ĉeso ne estas ankoraŭ formaligita, do mi evitas vian preteriton) teknologie en la nuna jarcento, sed sociologie en la antaŭa. Konsekvence Flávio Rebello faris pli ol unu strategian eraron. Lin iom senkulpigas la socia periferieco, kompare kun la kerno de Esperantio, kiu daŭre estas en Eŭropo. Lin iom senkulpigas ankaŭ la masakra kampanjo de Kalle Kniivilä kontraŭ ITV, kiu ricevis la mortigan baton per la decido neniam kaj neniel apogi la projekton, decido alprenita de la UEA-Komitato en Florenco. Mi menciuj ankaŭ la cinikan indiferecon de UEA-gvidantoj, komentarie pri la sorto de *Ĝangalo*. Rilate al *Rok-Gazet'* — jes, ĝi esprimis maljunecan pensmanieron, ĉar nur maljunuloj estas tiel fermitaj en si mem, por rifuzi dufoje proponon pri kunlaboro kaj eĉ financado, sen ajna kondiĉigo por la redakta linio. Kaj efektive, kiom aĝas nia amiko Martorell? Ĉu la membraro de *Eurokka*, faka asocio aliĝinta al TEJO, estas en TEJO-aĝo? Provoke respondante al via provoka demando, mi tute ne intencas malagnoski ies meritojn: mi simple klopodas proksimiĝi al la klarigo pri la tuta fenomeno, kiujn vi nomis “la aŭtunaj estingiĝoj”.

LOdE: Ĉu vi celas diri, ke iuj iniciatoj estus povintaj savi sin, sed preferis sin mortigi?

GS: En la ekzamenata kunteksto, la certeco pri la suicido ekzistas nur kiam oni mensogas pri la kaŭzoj de la morto. Ekzemple en *Sennaciulo* aperis mensogo, kun tri subskriboj, pri la ĉeso de *La Migranto*, organo de TANEF: ne estas vere, ke neniu sin proponis por transpreni la produktadon de la naturamika revueto. Simple tiuj kiuj sin proponis eĉ ne ricevis respondon.

LOdE: Vi aludas al *Sennaciulo*, kiu baldaŭ devos trovi novan redakcion kaj duonigos sian aperoftecon. Pri la ĉeso de *La Migranto* kaj de *Rok-Gazet'* vi jam diris. Kio pri *Fonto*? Kial tiom da gazetoj nun malaperas? Ja ne pro la konkurenco de interreto, kiel kelkaj kred(ig)as?

GS: Ne. Interreto eĉ helpas al la paperaj gazetoj. Sen interreto ne eblus redakti la periodaĵojn de LF-koop en Italio, Francio, Svislando aŭ eĉ Togolando, kaj eldoni ilin en Bulgario, ekzemple. Iam la murdisto de la esperanto-gazetoj estis la preskostoj. Hodiaŭ la murdisto nomiĝas Poŝto. La

ekspedokostoj terure altiĝas, en epoko kiam la privataj flugoj kaj la telefono fariĝas malmulte kostaj. Al tio kupliĝas la manko de laborfortoj, la laciĝo, la maljuniĝo de la produktantoj.

LOdE: Ĉu vi vidas komunan fadenon inter la diversaj estingiĝoj?

GS: Ili ĉiuj havas proprajn, specifajn klarigojn. La ĝenerala krizo de la kurtondaj radioj kaj la tro longa influo de homoj kompromititaj kun la “ancien régime” havas sian pezon ĉe la silentigo de Radio Polonia, Esperanto-Fako. La ĝenerala krizo de la SAT-medio havas sian pezon ĉe *Sennaciulo* kaj TANEF-*La Migranto*. Komuna fadeno estas, ke la leĝoj de la merkato komencas validi por ĉiuj. Kial *Fonto* perdadis abonantojn, dum la abonantaro de *La Ondo de Esperanto* kreskadas (eĉ malgraŭ rasisma artikolo de Komitatano Z)? Ĉu la organo de UEA aŭ la organo de SAT havus saman kvanton da abonantoj, se ili ne estus devige abonendaj fare de la societanoj? Komuna fadeno estas, ke temas pri redakcioj: de *Fonto* aŭ de *Ĝangalo*, de Pola Radio aŭ de *Sennaciulo*, de *Rok-Gazet'* aŭ de *La Migranto*. Konkludo: estas okazanta rapida evoluo en la interna komunikada kaj informada sistemo de Esperantio, evoluo kiu certgrade spegulas ankaŭ la transiron de finvenkisma al raŭmisma (laŭ la signifo en PIV) esperanto-mondo.



Kunlaborantoj de la Esperanto-Redakcio de Radio Polonia

La novaj radioaŭtoritatoj ekfunkciis fine de julio nunjare. Jam dum la unua renkonto kun la superulo de Radio Polonia ni eksciis pri neceso kontraŭbatali “postkomunistajn influojn, regantajn en tiu programo de 16 jaroj”. Komence de oktobro la sama membro de la radiaj aŭtoritatoj signalis estontecan koncepton de nia programo. Laŭ ĝi al signifa plukonstruo subiĝos programoj en la ukraina kaj belorusa lingvoj, oni enpraktikigos instrukciadon de ĵurnalistoj el Ukrainujo kaj Belorusujo kaj por la ĵus menciitaj landoj, oni intensigos pollingvan emisiadon al ĉi tiuj landoj.

<...>

Mi petas vian subtenon. Unuavice pere de nacilingvaj korespondaĵoj direktataj al polaj ambasadoj, polaj kultur-institutoj en diversaj landoj kun la demando pri la estonteco de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio. Kun elmonro de intereso por ĝia promocio rolo koncerne Pollandon, koncerne ĝian orientan politikon, kiu estas difinata kiel la orienta politiko de EU. Gravaj plurfoje esprimita de niaj aŭskultantoj opinio, ke niaj elsendoj estas por ili unu el malmultaj aŭ eĉ unusola informfonto pri Pollando, ĝiaj atingiĝoj kaj progresoj, sed krome pri Belorusujo kaj Ukrainujo.

El alvoko de **Barbara Pietrzak**
estro de la Esperanto-Redakcio de Radio Polonia

Li simple malpravas

La recenzo de Alen Kris pri PMEG en *LOdE* n-ro 11 (145) 2006 estas al mi tre miriga. Opinion negativan pri PMEG oni kompreneble rajtas havi, sed tiel rabian kaj insultan atakon mi tute ne antaŭvidis. Pro dufoja mencio de “demenco” mi demandas, kiel *LOdE* entute povis akcepti tian recenzon.

Inter la multaj tre dubindaj asertoj kaj komentoj en tiu recenzo mi nun tamen komentos nur unu temon, ĉar — kvankam Kris tute malpravas — tio, kion li skribis, almenaŭ estas serioza kaj seninsulta:

Kris skribis:

«Antaŭ cent jaroj ĝuste la ĉirkaŭleksika disputo provokis la skismon en la Esperanto-movado. En certaj momentoj la elekto, al kiu sin klinis la adeptoj de origina Esperanto ne estis optimuma. La tento havi la simplan paron “piloto”- “piloti” malfermas la vojon al aliaj simplaj paroj, kies verbaj duonoj (“homi”, “patrini”, “tabli”) apenaŭ havas sencon.

Alia solvo, kiu neŭtraligus la kritikon de Couturat, ne neglektas la Fundamenton. Ĝi proponas la uzon de “-um-”: “pilotumi”, “orumi” ktp. Tiu solvo restas ĝis nun legitima, kaj mi ĝin rekomendas al adeptoj de pli konsekvenca lingvaĵo.

[...]

Fakte “piloti” nur ŝajnas pli kurta kaj oportuna formo, ĉar ĝi postulas la varianton “pilotado” (kun la monstra “pilotado” logikperspektive), la dissencon en la formoj “pilota” kaj “pilote” (ĉu rilate al “piloto”, ĉu al “piloti”?) ktp.

[...]

Novtradicie, PMEG ne ŝatas la sufikson -um- en la okazoj, kiam “simpla sensufiksa verboformo ... bone taŭgas”: ne “butonumi”, sed “butoni”, ne “salumi”, sed “sali”. Pri tiu “bona taŭgo” mi jam parolis supre».

Ŝajnas, ke Kris pensas, ke tia rekta verbigo de radikoj kiel PILOT/, BROS/, BUTON/ kaj SAL/ estas iaspeca modernaĵo, kiu akre kontrastas kun la tradicia uzo. Tiel simple ne estas.

Jam ĉe Zamenhof oni trovas verbojn kiel “gasti”, “profeti” kaj “reĝi”, kiuj plene analogas kun la kritikata “piloti”: “Ofte, kiam ni ie gastas...” (el *La Revizoro*)

“Al Vi, kiu kreas, al Vi kiu reĝas” (el *Preĝo sub la verda standardo*)

“Eldad kaj Medad profetas en la tendaro.” (el la Malnova Testamento, Nombroj 11:27)

Ankaŭ ekzemploj kun ilaj kaj substanciaj radikoj trovblas ĉe Zamenhof:

“Li brosis al si la botojn kaj la surtuton.” (el *Fabeloj de Andersen 1*)

“Ĉiujare [...] ili [= la rozoj] defalas, la vilaĝanino ilin salas.” (el *Fabeloj de Andersen 2*)

Tia nescio de la Zamenhofa lingvouzo eble povas por iuj sufiĉi por konstati, ke Kris ne estas kompetenta por recenzi tian verkon kiel PMEG, sed mi kontentiĝas konstati, ke tiu punkte (same kiel pri multaj aliaj asertoj en la recenzo) li simple malpravas.



La verda ŝtelo

Li estis konata kiel stelo en la verdula mondo. Neniu kredis, ke li povus ŝteli ion ajn. Tamen montriĝis, ke li estas tiel avida je la verda koloro, ke li kleptomanie ŝtelis iun ajn objekton kiu estis kolorigita per la verda koloro. Li tiel freneziĝis pri la verda koloro, ke li eĉ ŝtelis la verdan koloron en la komputiloj de ĉiu verdulo en la mondo, ne grave ĉu ili parolas la Internacian Lingvon aŭ ne.

Nun mi rakontu kiel li agis por ŝteli la verdan koloron de la esperantaj simboloj, ekzemple la Esperanta Flago, kiuj post la ŝtelo nur estas montrataj kiel nigra-blankaj bildoj.

Tre frue en la mateno li alvenis al la oficejo de UEA kaj tie li kaŝe eniris en la ĉambron kie la oficista komputilo troviĝas. Kun avida mieno li konstatis, ke troviĝas abundo da libroj kun verdaj kovriloj. Li unue metis la librojn kun verdaj kovriloj en la sakon kiun li kunportis. Poste li prenis, el alia sako, ekvivalentajn ekzemplerojn kun nigra-blankaj kovriloj kaj metis ilin en la librobretaron.

La fia verdulo travivis ian krizon kiun oni povus nomi la “verdkolora sindromo”. Nu, onidire, krizo tre ofte estas indiko pri baldaŭa resaniĝo.

Kara leganto, vi atentu, ke ankaŭ troviĝas (en la verdula lingvo) la vorto “kriso”, kiun oni uzas kiam oni celas malajan ponardon kun zigzagforma klingo. Do estas ege grave, ke vi elparolas la vortojn “krizo” kaj “kriso” klare kiam vi parolas la Internacian Lingvon (ILO), kiu ja estas la ĝusta nomo de la lingvo, kiun oni kutime nomas: Esperanto.

En Esperantujo oni pigre nomas “La Fia Verdulo”-n “Lafivo”. Lafivo opinias, ke nur li komprenas kiel oni esprimu sin per ILO kaj tial li ankaŭ okupas sin pri kritikado de libroj, kiujn li plej ofte, pike, nomas “libraĉoj” pro tio ke la verkinto de la libro ne sekvis la samajn principojn kiel li, kiam oni esprimas sin per ILO.

Lafivo estis tiel miopa pri sia altega lerteco pri ILO, ke li tute forgesis, ke ekzistas abundo da ordinaraj uzantoj de ILO kiuj uzas ILO-n same malprecize kiel sian nacian lingvon. T.e. oni pigre forigas (elizas) vortojn kaj lasas al la aŭskultanto / kunparolanto mem, konscie aŭ subkonscie, kompletigi la frazon je malkodigo de la parolataj vortoj en sia cerbo. La plej stranga afero estas, ke Lafivo ne rimarkis kiam li mem esprimas sin malklare.

Nu, parolante pri pikanta recenzisto eble estas interese scii, ke “aleno”, laŭ PIV, priskribas rektan aŭ kurban stangeton uzatan de ledlaboristo aŭ ŝuisto por fari truojn je stebado, tio estas je kunkudrado de, ekzemple, du ledpecoj. Do, kaj la vorto “kriso” kaj “aleno” indikas pikilojn aŭ truigilojn, aŭ, se ili estas uzataj je bestoj aŭ homoj, vundigilojn.

Nu, ni reiru al la rakonto pri kiel Lafivo ŝtelis la verdan koloron de la esperantosimboloj tutmonde.

Enirinte la oficejon li ŝaltis la komputilon de la oficisto kaj per kelkaj tre lertaj trukoj li alvokis la operaciumon kaj registris virusprogramon kiu nuligis la kolorojn blua, flava kaj ruĝa en la komputiloj al kiuj la oficisto sendos siajn, laŭ Lafivo, lingvaĵe aĉajn mesaĝojn.

Do, nun vi scias la kialon, kial ĉiuj verdaj simboloj por ILO nur estas montrataj nigre-blankaj.

S-ro Espondo

Bertilo Wennergren

Espereble aperos aliaj recenzoj...

La recenzo de Alen Kris, aperinta en *La Ondo de Esperanto* 145, estas interesa, ĉar ĝi “recenzas” ne nur PoMEGon, sed ankaŭ Esperanton mem, ekzemple jene:

Oni vane serĉas en PMEG eĉ mencion pri la gramatika kategorio de la aspekto. La plej grava problemo de Esperanto estas, ke en sia verba sistemo ĝi imitas slavan tritempan konstruon sen heredi la aspektan kategorion de slavaj verboj.

Do, kial PMEG devus mencii rusan gramatikan kategorion, kiu laŭ la rusa recenzanto eĉ ne ekzistas en Esperanto?

Estas interese ankaŭ, ke forte agacas la recenzanton la sinteno de PMEG al la seksa signifo de O-vortoj. Mi bedaŭrinde (ankaŭ?) ne detale trastudis Pomegon, sed tiu sekcio (4.2) ĉiam ŝajnis al mi plene logika kaj absolute kongrua kun la lingvouzo de bonaj aŭtoroj.

Tamen nemalmultaj rusaj kaj aliaj orienteŭropaj esperantistoj (kaj esperantistinoj...) insistas konsekvence skribi NUR “instruistino”, “doktorino” ktp, kiam temas pri virinoj, kaj kompreneble la rusa recenzanto aliĝas al tiu skolo, parolante pri “la tre moda kaj agresema kontraŭseksismo” kiu laŭ li aperas en PMEG, kaj konsilante al Bertilo Wennergren pli bone studi la “Lingvaj Respondojn” de... kompreneble, la ruso Sergio Pokrovskij. Ĉiu faru laŭplaĉe, kompreneble, sed mi preferas la pritrakton en PMEG.

Pri la multloke misa, eĉ intence misinforma citado sufiĉas ekzempli per la jena kritika skribaĵo de la recenzanto:

La fragmento pri demandoj kaj respondoj entenas traktadon pri Okcidenta kaj Orienta sistemoj de respondo al negativaj demandoj (pp. 333–335), kiu prezentiĝas tute fantazia. Laŭ PMEG, al la demando ‘Ĉu vi ne volas kafon?’ en konfirma okazo okcidente oni respondus Ne, kaj oriente — Jes. Kaj inverse, al la sama demando en dementa okazo okcidente oni respondus Jes, kaj oriente — Ne. Certe, oni bezonas ĝustigi la geografiajn terminojn...

Kaj poste li plu klarigas, kiel rusoj kaj francoj respondus al tiu demando, laŭ lia opinio. Sed efektive li kritikis ion, kio tute ne estas dirita en PMEG. Tio, kion PMEG vere diras, aspektas jene:

Ekzistas du manieroj uzi respondvortojn ĉe negativaj demandoj. Unu sistemo estas pli ofta en okcidentaj lingvoj, la alia sistemo estas pli ofta en orientaj lingvoj. Tial oni povas paroli pri okcidenta kaj orienta uzado, sed fakte en multaj landoj kaj lingvoj ambaŭ sistemoj ekzistas paralele. Ankaŭ en Esperanto ambaŭ sistemoj estas hejmaj. Zamenhof pli ofte uzis jes kaj ne laŭ la okcidenta sistemo, sed li ankaŭ plurfoje uzis la orientan sistemon.

La priskribo, kiu sekvas, estas detala, preciza, kaj proksime kongruas kun miaj personaj spertoj pri la reale ekzistanta lingvouzo. Do, laŭ sia kutimo, Bertilo Wennergren estas tre objektiva, dum la recenzanto evidente simple volas trovi ion por kritiki. Same stranga estas la kritiko de la jena frazo de Bertilo Wennergren: “Estus bone, se nur unu sistemo ekzistus en Esperanto”. Laŭ la recenzanto, tio estas “nereala propono”, sed li tute preteratentas la daŭrigon de Bertilo: “Sed ŝajnas, ke ne estas eble atingi tute unuecan uzon de unu sola sistemo. Ambaŭ uzoj estas hejmaj en la lingvo.”

Pri la ampleksa kritiko, kiun la recenzanto direktas kontraŭ la gramatikaj terminoj uzataj en PMEG, apenaŭ indas paroli. Al mi la terminologio de Bertilo plaĉas, ĉar ĝi kongruas kun la maniero laŭ kiu li priskribas la lingvon: ne

surbaze de klasikaj ŝablonoj, sed elirante el la lingvo mem. Al Alen Kris la terminologio de Bertilo ne plaĉas, kaj li rajtas ĝin kritiki, sed mirigas la persisto kun kiu li atakas ĉiun unuopan eron de tiu terminologio. Ĉu ne sufiĉus ĝenerala kondamno?

Nu, espereble aperos aliaj recenzoj. Kaj ŝajnas ke esperantistoj jam memstare malkovris la valoron de PMEG, uzante ĝin de jaroj en la reto. La plej bona recenzo de PMEG estas la fakto, ke ĝi jam elĉerpiĝis kaj ĉe UEA kaj ĉe FEL, nur kelkajn monatojn post la ekvendo. Sed espereble nova stoko estas denove survoje, ie meze de la Atlantiko.

Kalle Kniivilä

La rolo de la Fundamento

Mi kredas ke la lastatempaj reagoj al la recenzo de PMEG en la novembra numero de *La Ondo* ekzemplas la veran rolon de la Fundamento en la historio de Esperanto — rolo iom alia ol tiu kiun oni kutime imagas. Ne gravas la enhavo de la Fundamento, nek ĝia aŭtoritato en si mem. Ĝia graveco kuŝas en tio ke ĝi malplipezigas la aŭtoritaton de ĉiuj aliaj Esperanto-gramatikoj.

La ekzisto de la Fundamento permesas al ni resti tute trankvilaj pri la sorto de la lingvo eĉ post la plej vitriola recenzo de grava referenca verko. Se PMEG adekvate priskribas la lingvon tiel kiel ĝi kontinue evoluis de 1905 ĝis nun, tiam ĝi estas konsultinda; se ne, oni povas atendi (aŭ mem entrepreni) la aperon de io pli bona. Tiel simpla elekto ne eblus sen la aŭtoritat-sorba rolo de la Fundamento; tiam la tuta lingvokomunumo sentus devon atingi komunan opinion pri PMEG kaj eventuale pripensi sankciojn kontraŭ la aŭtoro aŭ la recenzinto.

Jens Stengaard Larsen

Tute nekompreneblaj...

Bonorde mi hodiaŭ ricevis la novan numeron 2006/11 de *La Ondo*. En la unua-paĝa superrigardo mi tuj vidis la anoncon “Wolfgang Kirschstein pri la vortoj de la Papo”. Mi serĉis la kontribuon kaj estis — seniluziigita.

La unua duono de la artikolo estas nekomprenebla aro da vortoj, verŝajne gravaj por la skribinto, sed nekompreneblaj por leganto.

Kaj la dua parto, finfine atinginte la titole anoncitan enhavon, atentigas al anglaj tekstoj en la komputoro kun komplikaj adresoj, finfine tute nekompreneblaj por mi.

Nek pri la papa profesora prelego nek pri la responda de la 38 islamaj kleruloj oni ricevas iun ajn informon. Do mi devas kontentiĝi pri miaj multaj germanlingvaj informoj, kiujn mi legis en multaj gazetoj kaj kiuj vere estis multeldiraj.

Sed kion pensas kaj diras la pensantoj de aliaj popoloj pri tiuj gravaj demandoj de la homaro?

Bernhard Eichkorn

Malgraŭ granda intereso en la urbo kaj internacie, ni estas devigitaj nuligi la Zamenhofan Semajnfinojn en Kaliningrado (8–10 dec 2006) pro la sanproblemoj de la ĉeforganizanto, prezidanto de Kaliningrada Regiona Esperantista Unuiĝo (KREU), Halina Gorecka.

Ni deziras al ŝi pliboniĝon de la sano!

Komitato de KREU

La Ondo de Esperanto



La ruĝa floro

de *Vsevolod Garšin*

La mallonga vivo de Vsevolod Garšin (1855–1888) estis eventoriĉa: familia dramo, volontula armea servo en la Balkana Milito (1877), vundo, frekventado de universitataj lekcioj, socia polemikado, hereda mensmalsano kaj frenezulejo, kontorista servo, emociigoj kaj depresioj, tolstoĵanismo, kaj fine suicida salto. Kaj nur du novelaroj, kiuj tamen, laŭ Gleb Uspenskij, “elĉerpe entenas la tutan enhavon de nia vivo”.

La ruĝa floro, verkita en 1883 kelkajn monatojn post la feliĉa edziĝo, estas lia plej fama novelo. Ĝi estis longe kaj malsame diskutata de literaturistoj kaj publicistoj. Ili trovis en ĝi ideojn filozofiajn, politikajn, sciencajn kaj mitologiajn, strebon ŝanĝi la mondon per sinofero, eternan kontraŭstaron de la Donkiĥota kaj Hamleta ecoj de la homo, kaj ne ĉiam adekvate taksis ĝian estetikan valoron.

*Memore pri
Ivan Sergejeviĉ Turgenev*

I

— **Je la nomo de lia imperiestra moŝto**, sinjoro imperiestro Petro la Unua, mi anoncas revizion de ĉi tiu frenezulejo!

Tiuj vortoj estis diritaj per laŭta, akra, sonora voĉo. La malsanuleja skribisto, kiu estis registranta la malsanulon en granda trivita libro sur tablo, makulita per inko, ne povis reteni rideton. Sed ne ridis du junuloj, akompanantaj la malsanulon. Ili apenaŭ staris surpiede post du diurnoj, pasigitaj sen dormo kun la frenezulo, kiun ili ĵus alveturigis fervoje. En la antaŭlasta stacio la paroksismo de frenezo plifortiĝis. Ie oni trovis trudkilon kaj, vokinte ĝendarmon, metis ĝin sur la malsanulon. Tiel oni alveturigis lin en la urbon, tiel oni venigis lin ankaŭ en la malsanulejon.

Li aspektis terure. Super griza vestaĵo, ŝirita ĝisĉifone dum la lasta paroksismo, jako el kruda veltolo kun larĝa surbrusta malfermaĵo strikte kovris lian korpon. La longaj manikoj alpremis liajn krucitajn brakojn al la brusto kaj estis ligitaj malantaŭe. En la inflamaj larĝe malfermitaj okuloj (li estis maldorminta dek diurnojn) brulis senmova arda brilo. Nervozaj konvulsioj tremigis la randon de lia malsupra lipo. La taŭzigitaj krispaj haroj ĉevalvoŝte kovris la frunton. Li iris je rapidaj pezaj paŝoj el unu angulo de la oficejo en alian, scivoleme rigardante malno-

vajn ŝrankojn kun paperoj kaj seĝojn, tegitajn per laktolo, de tempo al tempo rigardante al siaj akompanantoj.

— Konduku lin en la fakon. Dekstren.

— Mi scias, scias. Mi estis jam ĉi tie kun vi pasintjare. Ni inspektis la malsanulejon. Mi ĉion konas, kaj trompi min estos malfacile, — la paciento diris.

Li turniĝis al la pordo. La gardisto malfermis ĝin antaŭ li. Li eliris el la oficejo same rapide, peze kaj senhezite, levinte alten la frenezan kapon, kaj preskaŭ kure direktiĝis dekstren, en la fakon de mensmalsanuloj. La akompanantoj apenaŭ sukcesis sekvi lin.

— Sonorigu. Mi ne povas. Vi ligis miajn brakojn.

La pordisto malfermis la pordon, kaj la vojaĝantoj eniris la malsanulejon.

Ĝi estis granda ŝtona domo, konstruita antaŭ longe kontraŭ ŝtata mono. La suban etaĝon okupis du grandaj salonoj: unue, manĝejo, due, komuna ejo por trankvilaj pacientoj; larĝa koridoro kun vitra pordo, kondukanta en ĝardenon kun florbedoj, kaj ĉirkaŭ dudeko da apartaj ĉambroj, kie loĝis la pacientoj. Samloke estis du mallumaj ĉambroj: unu tapetita per matracoj, la dua — per tabuloj. La ĉambroj estis destinitaj por furioze konduktantaj malsanuloj. Krome, estis grandega tenebra ĉambro kun volboj: banejo. La supran etaĝon okupis virinoj. De tie aŭdiĝis senorda bruo, interrompata de hurloj kaj kriegoj. La malsanulejo estis aranĝita por okdek personoj, sed,

ĉar ĝi servis por kelkaj najbaraj gubernioj, en ĝi lokiĝis ĝis tricent. En la malvastaj ĉambretoj staris po kvar kaj eĉ kvin litoj. Vintre, kiam oni ne el-lasis la malsanulojn en la ĝardenon, kaj ĉiuj fenestroj estis hermetike fermitaj, en la malsanulejo iĝis neelteneble sufoke.

La novan pacieron oni kondukis en ĉambron, kie troviĝis bankuvoj. Eĉ sanan homon ĝi povus impresi peze, sed homon kun malorda, ekscitita imagipovo ĝi efikis precipe peze. Ĝi estis granda ĉambro kun volboj, lumigata tra sola fenestro, farita en angulo, kaj havis gluecan ŝtonan plankon. La muroj kaj volboj estis farbitaj per malhelruĝa olefarbo. En la planko, nigriĝinta pro malpureco, samnivele kun ĝi estis enmuntitaj du grandaj ŝtonaj bankuvoj, kiel du ovalaj kavoj, plenigitaj per akvo. Grandega kupra forno kun cilindra kaldrono por varmigi la akvon kaj kun tuta sistemo de kupraj tubetoj kaj kranuoj okupis angulon kontraŭ la fenestro. Ĉio ĉi estis eksterordinare tenebra kaj fantaziveka por la senorda kapo. Kaj la gardisto, kiu estris la banejojn, dika, ĉiam silentanta ukraino, per sia tenebra fizionomio plifortigis la impreson.

Kiam oni alkondukis la pacieron en ĉi tiun teruran ĉambron por bani lin kaj (laŭ la kuracsisistemo de la malsanuleja ĉefkuracisto) glui sur lian nukon grandan plastron, lin kaptis hororo kaj furiozo. Absurdaj pensoj, unu pli monstra ol alia, ekmoviĝis en lia kapo. Kio ĝi estas? Ĉu inkvizicia torturejo? Ĉu loko de sekreta ekzekuto,

kie la malamikoj decidis likvidi lin? Ĉu, eble, la infero mem? En lian kapon finfine venis la penso, ke eble tio estas ia elprovo. Oni senvestigis lin malgraŭ lia obstina rezisto. Kun forto duobla pro la malsano li facile elŝiris sin el la manoj de kelkaj gardistoj, per tio faligante ilin sur la plankon. Finfine kvarope oni surplankigis lin kaj, kaptinte je la brakoj kaj gamboj, mallevigis lin en varman akvon. Ĝi ŝajnis al li bolanta, kaj en la freneza kapo fulmis malkohera fragmenta penso pri elprovo per bolakvo kaj inkandeska fero. Misglutante la akvon kaj spasme baraktante per la brakoj kaj gamboj, je kiuj la gardistoj firme tenis lin, li, anhelante, kriis malkoheran parolon, pri kiu ne eblas havi imagon, ne aŭdinte ĝin reale. Ĝi enhavis kaj preĝojn, kaj anatemojn. Li kriis ĝis kiam elĉerpiĝis liaj fortoj, kaj finfine mallaŭte, kun varmegaj larmoj, eldiris frazon tute malkonforman al tio, kion li diris antaŭe:

— Sankta granda martiro Georgo! Al vi enmanigas mi korpon mian. Sed la spirito — ne, ho, ne!..

La gardistoj plu tenis lin, kvankam li trankviliĝis. La varma banado kaj glacio, metita sur la kapon, efikis. Sed, kiam lin, preskaŭ svenintan, oni elprenis el la akvo kaj sidigis sur tabureto por alglui la plastron, la restintaj fortoj kaj frenezaj pensoj denove kvazaŭ eksplodis.

— Pro kio? Pro kio? — li kriis. — Mi al neniŭ deziris malbonon. Pro kio mortigi min? Ho-o-o! Ho, Dio! Ho, vi, martiroj, kiuj antaŭis min! Vin mi petegas, liberigu, savu!..

La bruliga tuŝo ĉe la nuko igis lin senbride konvulsii. La servistoj ne kapablis obeigi lin kaj ne sciis kion fari.

— Nenio fareblas, — diris soldato, faranta la proceduron. — Ni forviŝu.

Tiuj simplaj vortoj tremigis la pacienton. “Forviŝu!.. Kion forviŝu? Kiun forviŝu? Min!” — li pensis kaj fermis la okulojn en mortiga teruro. La soldato prenis je du randoj krudan viŝtukon kaj, forte premante, glitigis ĝin sur la nuko, forŝirante de sur ĝi kaj la plastron, kaj la supran tavolon de la haŭto kaj lasante nudan ruĝan skrapvundon. La doloro pro tiu proceduro, neeltenebla eĉ por sana homo, ŝajnis al la malsanulo la fino de ĉio. Li furioze impetis tutkorpe, elŝiriĝis el la manoj

de la gardistoj, kaj lia nuda korpo ekruĝiĝis sur la ŝtonaj slaboj. Li pensis, ke oni forhakis lian kapon. Li volis ekkrii, sed ne povis. Oni forportis lin sur liton en sveno, kiu transiris en profundan kaj longan dormon.

II

Li rekonsciĝis nokte. Estis plena silento. El la najbara granda ĉambro aŭdiĝis spirado de dormantaj pacientoj. Ie malproksime monotone, strangavoĉe parolis kun si mem paciento, lokita por nokto en malluma ĉambro, kaj supre, en la virina fako, raŭka kontralto kantis iun sovaĝan kanton. La paciento fikse aŭskultis tiujn sonojn. Li sentis teruran malfortecon kaj lacegon en ĉiuj korpopartoj. Lia kolo tre doloris.

“Kie mi estas? Kio okazis al mi?” — la penso venis en lian kapon. Kaj subite kun neordinara klaro li imagis la lastan monaton de sia vivo, kaj li komprenis, ke li malsanas, kaj kio estas la malsano. Plurajn absurdajn pensojn, parolojn kaj agojn li rememoris, kaj tio tremigis lin tutan.

— Sed tio estas finita, dankon al Dio, finita! — li flustris kaj denove ekdormis.

La malfermita fenestro kun feraj kradoj rigardis al malgranda strateto inter grandaj domoj kaj ŝtona barilo. Tiun strateton oni neniam eniris, kaj ĝi estis dense kovrita de iu sovaĝa arbustaro kaj siringoj, pompe florantaj tiusezone... Malantaŭ la arbustoj, rekte kontraŭ la fenestro, nigris alta barilo. Altaj arboj de granda ĝardeno, surverŝitaj kaj trafenitaj de luna lumo, rigardis el trans ĝi. Dekstre altis la blanka konstruaĵo de la malsanulejo kun lumigitaj elinterne fenestroj kun feraj kradoj. Maldekstre — blanka, hela pro la luno, senfenestra muro de kadavrejo. La luna lumo falis tra la fenestra krado en la ĉambron, sur la plankon, kaj prilumis parton de la lito kaj la elturmentitan, palan vizaĝon de la paciento kun fermitaj okuloj. Nun ĝi tute ne estis freneza. Tio estis profunda, peza dormo de elturmentita homo, sen sonĝoj, sen plej eta moviĝo kaj preskaŭ sen spiro. Por kelkaj momentoj li vekigis plenkonscie, kvazaŭ sana, por ellitiĝi matene la sama frenezulo.

III

— Kiel vi fartas? — la doktoro demandis lin sekvatage.

La paciento, ĵus vekiginte, ankoraŭ kuŝis sub la litkovrilo.

— Bonege! — li respondis, salte ellitiĝante, surmetante ŝuojn kaj kaptante negliĝan mantelon. — Bonege! Nur sole: jen!

Li montris sian nukon.

— Mi ne povas turni la kolon sen doloro. Sed tio ne gravas. Ĉio bonas, se oni komprenas. Kaj mi komprenas.

— Ĉu vi scias, kie vi estas?

— Certe, doktoro! Mi estas en la frenezulejo. Sed ja, se oni komprenas, tio tute ne gravas. Tute ne gravas.

La doktoro fikse rigardis liajn okulojn. Lia bela dorlotita vizaĝo kun bonege kombita orkolora barbo kaj kvietaj blujaj okuloj, rigardantaj tra la oraj okulvitroj, estis senmova kaj senemocia. Li observis.

— Kial vi tiel fikse rigardas min? Vi ne legos tion, kio estas en mia animo, — la paciento daŭrigis, — sed mi klare legas, kio estas en la via! Por kio vi faras la malbonon? Por kio vi kolektis tiun amason da malfeliĉuloj kaj tenas ĝin ĉi tie? Por mi tute ne gravas: mi ĉion komprenas kaj trankvilas. Sed ili? Por kio tiu sufero? Por homo, kiu atingis staton, kiam en lia animo estas granda penso, universa penso, por li tute ne gravas, kie loĝi, kion senti. Eĉ ĉu vivi aŭ ne vivi... Mi ja pravus, ĉu ne?

— Eble, — la doktoro respondis, sidiĝante sur seĝo en angulo de la ĉambro tiel ke li povu vidi la pacienton, kiu rapide iradis el angulo en angulon, plaŭdante per la grandegaj ŝuoj el ĉevala ledo kaj svingante la baskojn de la negliĝa mantelo el kotona ŝtofo kun larĝaj ruĝaj strioj kaj grandaj floroj. Akompanantaj doktoroj, asistanto kaj inspektisto daŭre staris en atenta streĉo ĉe la pordo.

— Kaj mi havas ĝin! — la paciento eksklamaciis. — Kaj, kiam mi trovis ĝin, mi eksentis min renaskiĝinta. La sentoj iĝis pli subtilaj, la cerbo funkcias pli bone ol antaŭe. Kion mi antaŭe povus atingi per longa vico de silogismoj kaj konjektoj, nun mi ekkonas intuicie. Mi reale atingis tion, kion produktis filozofio. Mi travivas en mi mem grandiozajn ideojn pri tio, ke la spaco kaj tempo estas fikciaĵoj.

Mi vivas en ĉiuj jarcentoj. Mi vivas ekster la spaco, ĉie aŭ nenie, kiel vi preferas. Kaj pro tio por mi ne gravas, ĉu vi tenos min ĉi tie aŭ ellasos min, ĉu mi estas libera aŭ ligita. Mi rimarkis, ke ĉi tie estas ankoraŭ kelkaj tiaj homoj. Sed por la cetera amaso tiu stato estas terura. Kial vi ne liberigas ilin? Kiu bezonas...

— Vi diris, — la doktoro interrompis lin, — ke vi vivas ekster la tempo kaj spaco. Tamen ne eblas ne konsenti, ke ni kaj vi estas en tiu ĉi ĉambro kaj ke nun, — la doktoro elprenis horloĝon, — estas duono post la deka, la 6-a de majo 18**. Kion vi opinias pri tio?

— Nenion. Por mi tute ne gravas, kie esti kaj kiam vivi. Se por mi tute ne gravas, ĉu tio ne signifas, ke mi estas ĉie kaj ĉiam?

La doktoro rikanis.

— Rara logiko, — li diris, ekstarante. — Verŝajne vi pravas. Ĝis revido. Ĉu vi deziras fumi?

— Mi dankas. — Li ekstaris, prenis cigaron kaj nerveze formordis ĝian pinton. — Tio helpas pensi, — li diris. — Tio estas la mondo, la mikrokosmo. Ĉe unu ekstremo estas la alkaloj, ĉe la alia — la acidoj... Tia estas ankaŭ la ekvilibro de la mondo, en kiu neŭtraligas unu la alian antagonismaj elementoj. Adiaŭ, doktoro!

La doktoro iris plu. Plejparto de la pacientoj atendis lin, rekte kaj streĉe starante ĉe siaj litoj. Neniun ĉefon tiel respektas la subuloj, kiel kuraciston-psikiatron respektas ties mensmalsanuloj.

Kaj la paciento, restinte sola, impete paŝis plu el angulo en angulon de sia kamero. Oni alportis por li teon. Li, sen sidiĝi, duglute eltrinkis la grandan trinkpoteton kaj preskaŭ unumomente formanĝis grandan pecon da blanka pano. Poste li eliris el la ĉambro kaj dum kelkaj horoj senhalte iradis je sia rapida kaj peza paŝmaniero tra la tuta domo el unu ekstremo en alian. La tago estis pluva, kaj la malsanulojn oni ne ellasis en la ĝardenon. Kiam la asistanto komencis serĉi la novan pacieron, oni montris al li la finon de la koridoro. Tiu staris tie, tuŝante pervizaĝe la vitron de la ĝardena pordo, kaj fikse rigardis la floretojn. Lian atenton turnis al si neordinare ruĝa floro, speco de papavo.

— Bonvolu veni por pesado, — la

asistanto diris, tuŝante lian ŝultron.

Kaj, kiam tiu turniĝis vizaĝe al li, li preskaŭ retiriĝis ŝancele pro timo: tiom da furioza kolero kaj malamo brilis en la frenezaj okuloj. Sed, vidinte la asistanton, li tuj ŝanĝis la mienon kaj obeeme sekvis lin sen diri eĉ solan vorton, kvazaŭ trempita en profundan pensadon. Ili eniris la doktoran kabineton. La paciento mem stariĝis sur la plato de malgranda pesilo. La asistanto, pesinte lin, notis en libro apud lia nomo: 109 funtoj. La sekvan tagon estis 107, la trian — 106.

— Se tio daŭros plu, li mortos, — la doktoro diris kaj ordonis manĝigi lin laŭeble plej bone.

Sed malgraŭ tio kaj la nekutima apetito de la paciento li maldikiĝis ĉiutage, kaj la asistanto ĉiutage enskribis ĉiam pli kaj pli malgrandan kvanton da funtoj. La paciento preskaŭ ne dormis kaj tutajn tagojn pasigis en senĉesa moviĝado.

IV

Li konsciis, ke li estas en frenezulejo. Li konsciis eĉ, ke li estas malsana. Kelkfoje, kiel la unuan nokton, li vekiĝis meze de silento post tuta tago da vigla moviĝo, sentante doloron en ĉiuj korpopartoj kaj teruran pezon en la kapo, sed plenkonscie. Eble la foresto de impresoj en la nokta silento kaj duonlumo, eble la malforta funkciado de la cerbo de la ĵus vekiĝinta homo kaŭzis tion, ke en tiaj minutoj li klare komprenis sian staton kaj estis kvazaŭ sana. Sed post tagiĝo, kune kun la lumo kaj vekiĝo de la vivo en la malsanulejo lin denove onde superverŝis impresoj. La malsana cerbo ne povis venki ilin, kaj li denove estis freneza. Lia stato estis stranga miksaĵo de ĝustaj rezonadoj kaj absurdo. Li komprenis, ke ĉirkaŭ li ĉiuj estas malsanaj, sed samtempe en ĉiu el ili li vidis iun sekrete kaŝiĝantan aŭ kaŝitan vizaĝon, kiun li konis antaŭe aŭ pri kiu li legis aŭ aŭdis. La malsanulejo estis loĝata de homoj el ĉiuj tempoj kaj ĉiuj landoj. Ĉi tie estis kaj vivantoj, kaj mortintoj. Ĉi tie estis famuloj kaj fortuloj de la mondo, kaj soldatoj, mortigitaj dum la lasta milito kaj renaskiĝintaj. Li vidis sin en iu magia, sorĉita rondo, akumulinta en si la tutan forton de la tero, kaj en orgojla ekstazo li opiniis sin la cen-

tro de tiu rondo. Ĉiuj ili, liaj malsanulejaj kunuloj, ĉi tie kunvenis por plenumi aferon, kiun li svage imagis giganta entrepreno, celanta ekstermi la malbonon de la mondo. Li ne sciis, kio ĝi estos, sed li sentis en si sufiĉajn fortojn por plenumi ĝin. Li povis legi la pensojn de aliaj homoj. Li vidis en objektoj tutan ilian historion. Grandaj ulmoj en la malsanuleja ĝardeno rakontis al li longajn legendojn pri tio, kion ili travivis. La domon, efektive konstruitan antaŭ sufiĉe longe, li opiniis kreaĵo de Petro la Granda kaj certis, ke la caro loĝis en ĝi dum la epoko de la Poltava batalo*. Li legis tion sur muroj, sur forfalinta stukaĵo, sur pecoj de brikoj kaj kaheloj, kiujn li trovis en la ĝardeno. La tuta historio de la domo kaj ĝardeno estis skribita sur ili. Li loĝigis la malgrandan konstruaĵon de la kadavrejo per dekoj kaj centoj da jam delonge mortintaj homoj. Kaj li fikse okulumis fenestreton, rigardantan el ties subteretaĝo al angulo de la ĝardeno, vidante en malebena respegulaĵo de la lumo en la malnova iriza kaj malpura vitro konatajn trajtojn, kiujn li vidis iam en la vivo aŭ sur portretoj.

Intertempe venis serena, bona vetero. La malsanuloj pasigis tutajn tagojn en freŝa aero en la ĝardeno. En ilia fako de la ĝardeno, ne granda, sed dense kovrita de arboj, ĉie, kie eblis, estis plantitaj floroj. La inspektisto devigis labori en ĝi ĉiujn almenaŭ iom laborkapablajn pacientojn. Dum tutaj tagoj ili balais vojetojn kaj ŝutis sablon sur ilin, elsarkis herbaĉojn kaj akvumis fositajn de ili bedojn kun floroj, kukumoj, akvomelonoj kaj melonoj. Parton de la ĝardeno dense kovris ĉerizarboj. Laŭlonge de ĝi etendiĝis aleoj de ulmoj. Meze sur malgranda artefarita monteto estis aranĝita la plej bela floro en la tuta ĝardeno. Sur la randoj de la supra placeto kreskis helkoloraj floroj, kaj en la centro pompis granda kaj rara dalio, flava kun ruĝaj makuletoj. Ĝi konsistigis ankaŭ la centron de la tuta ĝardeno, altante super ĝi, kaj oni povis rimarki, ke multaj malsanuloj atribuis al ĝi ian misteran signifon. Al la nova paciento ĝi same ŝajnis io ne tute ordinara, paladio de la ĝardeno kaj domo. Ankaŭ floroj apud ĉiuj vojetoj estis plantitaj de malsanuloj. Ĉi tie estis plej diversaj floroj, troveblaj en ukrainiaj ĝardenetoj: altaj rozoj, helaj petunioj, arbustoj de altaj tabakplantoj

kun malgrandaj rozkoloraj floroj, mentoj, taĝetoj, tropeoloj kaj papavoj. Samloke, proksime al la perono, kreskis tri papavaj arbustetoj de nekutima speco. Ili estis multe pli malgrandaj ol la kutimaj kaj distingiĝis de ili pro la eksterordinara heleco de la skarлата koloro. Ĝuste tiu floro mirigis la pacienton, kiam li la unuan tagon post la veno en la malsanulejon rigardis la ĝardenon tra la vitra pordo.

Elirinte unuafoje en la ĝardenon, li antaŭ ĉio, ankoraŭ starante sur la ŝtupoj de la perono, rigardis tiujn helajn florojn. Ili estis nur du. Ili hazarde kreskis aparte de la ceteraj kaj sur nesarkita loko. Densa atriplaro kaj iaj altaj herbaĉoj ĉirkaŭis ilin.

La malsanuloj unu post alia eliris tra la pordo, apud kiu staris gardisto kaj donis al ĉiu el ili dikan blankan ĉapon, trikitan el koton, kun ruĝa kruco sur la frunto. Tiuj ĉapoj trapasis militon kaj estis aĉetitaj en aŭkcio. Sed la malsanulo, memkompreneble, atribuis al tiu ruĝa kruco specialan, misteran signifon. Li demetis la ĉapon kaj rigardis la krucon, poste la papavajn florojn. La floroj estis pli helaj.

— Ĝi venkas, — la paciento diris, — sed ni vidos, kio okazos.

Li descendis de sur la perono. Ĉirkaŭrigardinte kaj ne vidinte la gardiston, kiu staris malantaŭe, li transpaŝis bedon kaj etendis la manon al la floro, sed ne kuraĝis pluki ĝin. Li sentis varmegon kaj pikan doloron en la etendita mano, kaj poste ankaŭ en la tuta korpo, kvazaŭ intensa fluo de nekonata por li forto radius el la ruĝaj petaloj kaj trapenetras tutan lian korpon. Li moviĝis pli proksimen kaj etendis sian manon tre proksime al la floro, sed al li ŝajnis, ke la floro defendis sin, radiante venenan, mortigan spiron. Li sentis vertiĝon. Li faris lastan senesperan streĉon kaj jam kaptis la tigon, kiam peza mano malleviĝis sur lian ŝultron. Estis la gardisto, kiu kaptis lin.

— Ne licas pluki, — la maljuna ukraino diris. — Kaj sur la bedon ne paŝu. Multas ĉi tie vi, frenezuloj: ĉiu po unu floron, la tutan ĝardenon vi detruos, — li diris konvinke, ĉiam tenante lin je la ŝultron.

La paciento rigardis lian vizaĝon, silente liberiĝis de lia mano kaj maltrankvile iris laŭ la padeto. “Ho, kompatinduloj! — li pensis. — Vi ne vidas, vi blindiĝis tiel, ke vi protektas ĝin.

Sed estu kio ajn, mi ekstermos ĝin. Se ne hodiaŭ, do morgaŭ ni vidos, kiu pli fortas. Kaj se mi pereos, ĉu ne estas tute egale...”

Li promenis en la ĝardeno ĝis la vespero, konatiĝante kun homoj kaj strange interparolante, dum kio ĉiu el la interparolantoj aŭdis nur respondojn al siaj frenezaj pensoj, esprimataj per absurde-misteraj vortoj. La paciento iris jen kun unu kamarado, jen kun alia, kaj ĝis la fino de la tago li eĉ pli konvinkiĝis, ke “ĉio pretas”, kiel li diris al si mem. Baldaŭ, baldaŭ disfalos la feraj kradoj, ĉiuj ĉi malliberuloj eliros de ĉi tie kaj kuregos al ĉiuj partoj de la mondo, kaj la tuta Tero ektermos, forskuos de sur si la kadukan ŝelon kaj aperos en nova mirakla belo. Li preskaŭ forgesis pri la floro, sed, forirante el la ĝardeno kaj leviĝante sur la peronon, li denove vidis kvazaŭ du ruĝajn karbojn en la densa malheliĝinta herbaro, kiun jam komencis kovri roso. Tiam la paciento postrestis el la homamaso kaj, stariĝinte malantaŭ la gardisto, atendis oportunan momenton. Neniu vidis, kiel li transsaltis la bedon, kaptis floron kaj haste kaŝis ĝin sur sia brusto sub la ĉemizo. Kiam la freŝaj roskovritaj folioj tuŝis lian korpon, li morte paliĝis kaj en hororo larĝe malfermis la okulojn. Malvarma ŝvito aperis sur lia frunto.

En la malsanulejo oni ŝaltis lampojn. Atendante vespermanĝon, la plej granda parto de la pacientoj kuŝiĝis sur litoj, krom kelkaj maltrankviluloj, kiuj haste paŝis en la koridoro kaj ĉambre-

goj. La paciento kun la floro estis inter ili. Li iradis, spasme kunpremite la brakojn kruce sur la brusto. Ŝajnis, ke li volis dispremi, frakasi la planton, kaŝitan tie. Renkontante aliajn, li malproksime ĉirkaŭiris ilin, timante tuŝi ilin per basko de sia vesto. “Ne aliru, ne aliru!” — li kriis. Sed en la malsanulejo malmultaj atentis tiajn kriojn. Kaj li iradis ĉiam pli kaj pli rapide, faris paŝojn ĉiam pli kaj pli grandajn, iradis horon, du horojn en ia furiozo.

— Mi lacigos vin. Mi strangolos vin! — li parolis obtuze kaj malice.

Kelkfoje li grincigis la dentojn.

Oni alportis la vespermanĝon en la manĝejon. Sur la grandajn tablojn sen tablotukoj oni metis po kelkajn lignajn farbitajn kaj oritajn bovlojn kun maldensa milia kaĉo. La pacientoj sidiĝis sur benkoj. Oni disdonis al ili po pecon da nigra pano. Ili manĝis per lignaj kuleroj preskaŭ okope el la sama bovlo. Al kelkaj, kiujn oni nutris pli bone, manĝaĵo estis donita aparte. Nia paciento, rapide englutinte sian porcion, alportitan de la gardisto, kiu vokis lin en lian ĉambron, ne kontentiĝis per tio kaj iris en la komunan manĝejon.

— Permesu al mi sidiĝi ĉi tie, — li diris al la inspektisto.

— Ĉu vi ne vespermanĝis? — la inspektisto demandis, verŝante aldonajn porciojn da kaĉo en bovlojn.

— Mi tre malsatas. Kaj mi bezonas multe refortigi min. Tuta mia subteno estas en la manĝaĵo. Vi scias, ke mi tute ne dormas.


— Manĝu, karulo, por bona sano. Taras, donu al li kuleron kaj panon.

Li sidiĝis ĉe unu el la bovloj kaj formanĝis ankoraŭ enorman kvanton de la kaĉo.

— Nu, sufiĉas, sufiĉas, — la inspektisto diris fine, kiam ĉiuj ĉesis vespermanĝi, sed nia paciento ankoraŭ sidis, kliniĝinte super la bovlo. Li ĉerpis el ĝi per unu mano la kaĉon, kaj la alian forte premis al la brusto. — Vi tromanĝos.

— Ah, se vi sciis, kiom da forto mi bezonas, kiom da forto! Adiaŭ, Nikolaj Nikolajeviĉ, — la paciento diris, ekstarante de sur la seĝo ĉe la tablo kaj forte premante la manon de la inspektisto. — Adiaŭ.

La unua Esperanto-traduko de *La ruĝa floro* (de K. Boguŝeviĉ) aperis en 1905 en Parizo, 22 jarojn post la originalo.



— Kien do vi? — la inspektisto demandis kun rideto.

— Mi? Nenien. Mi restas. Sed eble morgaŭ ni ne renkontiĝos. Mi dankas vin pro via bonkoreco.


Kaj li ankoraŭ foje forte premis la manon de la inspektisto. Lia voĉo tremis, en la okuloj aperis larmoj.

— Trankviliĝu, karulo, trankviliĝu, — la inspektisto respondis. — Kial tiom mornaj pensoj? Iru, kuŝiĝu kaj profunde ekdormu. Vi bezonas pli multe dormi. Se vi dormos bone, vi baldaŭ resaniĝos.

La paciento ploreĝis. La inspektisto forturniĝis por ordoni al la gardistoj rapide forpreni la restaĵojn de la vespermanĝo. Post duonhora en la malsanulejo jam ĉio dormis krom unu homo, kuŝanta vestite sur sia lito en angula ĉambro. Li tremis kvazaŭ pro febro kaj spasme premis sian bruston, plene trasorbitan, kiel ŝajnis al li, per nekredible mortiga veneno.

V

Li ne dormis la tutan nokton. Li estis plukinta tiun floron, ĉar vidis en tiu konduto heroan agon, kiun li devis fari. Ĉe la unua rigardo tra la vitra pordo la skarlataj petaloj altiris lian atenton, kaj al li ŝajnis, ke ekde tiu minuto li plene konsciis, kion ĝuste li devas efektiviĝi en la mondo. En tiu hela ruĝa floro akumuliĝis la tuta malbono de la mondo. Li sciis, ke el papavoj oni produktas opion. Eble tiu penso, kreskante kaj ricevante monstrajn formojn, igis lin krei teruran halucinantan fantomon. La floro laŭ lia imago enkorpiĝis en si la tutan malbonon. Ĝi ensorbis la tutan senkulpe verŝitan sangon (ĝuste pro tio ĝi tiom ruĝis), ĉiujn larmojn, la tutan galon de la homaro. Ĝi estis mistera, terura estaĵo, antagonisto de Dio, Arimano, ricevinta modestan kaj senkulpan aspekton. Endis pluki kaj mortigi ĝin. Sed tio ne sufiĉos: endis ne lasi ĝin dum la morto elverŝi tutan sian malbonon en la mondon. Jen kial li kaŝis ĝin sur sia brusto. Li esperis, ke ĝis la mateno la floro perdos tutan sian forton. Ĝia malbono transiros en lian bruston, en lian animon, kaj tie ĝi estos venkita aŭ venkos — tiam li mem pereos, mortos, sed mortos kiel honesta batalanto kaj kiel la unua batalanto de la homaro, ĉar ĝis



Bildo de Neringa Štraitiėnė (speciale por La Ondo)

nun neniu kuraĝis batali samtempe kontraŭ la tuta malbono de la mondo.

— Ili ne vidis ĝin. Mi sukcesis vidi. Ĉu mi povas lasi ĝin vivi? Pli bonas morto.

Kaj li kuŝis, senfortiĝante pro la fantoma, neekzistanta batalo, tamen senfortiĝante. Matene la asistanto trovis lin apenaŭ viva. Sed malgraŭ tio post iom da tempo la ekscitiĝo venkis, li salte ellitiĝis kaj, kiel antaŭe, komencis kuradi tra la malsanulejo, parolante kun pacientoj kaj kun si mem pli laŭte kaj malkohere ol iam ajn. Oni ne lasis lin veni en la ĝardenon. Vidante, ke li malpeziĝas kaj neniam dormas, sed ĉiam paŝadas, la doktoro ordonis injekti sub lian haŭton grandan dozon da morfino. Li ne rezistis: feliĉe, tiumomente liaj frenezaj pensoj iel koincidis kun tiu procedo. Li baldaŭ ekdormis. La furioza moviĝado ĉesis, kaj la laŭta melodio, konstante akompaninta lin, kreita el la takto de liaj impetaj paŝoj, malaperis el la oreloj. Li senkonsciiĝis kaj ĉesis pensi pri ĉio, eĉ pri la dua floro, kiun endis pluki.

Tamen li plukis ĝin post tri tagoj, antaŭ la okuloj de la maljunulo, kiu ne sukcesis preventi tion. La gardisto ekpersekutis lin. Kun laŭta jubila krio la paciento enkuris la malsanulejon kaj, ĵetinte sin en sian ĉambron, kaŝis la planton sur la brusto.

— Hej, kial vi plukas la florojn? — demandis la alkurinta gardisto. Sed la paciento, jam kuŝanta sur la lito en la kutima pozo kun la krucitaj brakoj, ekparolis tian absurdon, ke la gardisto

nur silente demetis de sur li la ĉapon kun la ruĝa kruco, forgesitan en la hasta fuĝo, kaj foriris. Kaj la fantoma batalo rekomenciĝis. La paciento sentis, ke el la floro elrampas la malbono, kiel longaj, serpentosimilaj torentoj. Ili ĉirkaŭvolvis lin, kunpremante la membrojn kaj trasorbis la tutan korpon per sia terura enhavo. Li ploris kaj preĝis al Dio dum paŭzoj inter malbenoj, adresataj al sia malamiko. Ĝis la vespero la floro forvelkis. La paciento tretis la nigriĝintan planton, levis la restaĵojn de sur la planko kaj portis en la banĉambron. Ĵetinte la senforman buleton de verdaĵo en fornon, inkandeskan pro ŝtonkarbo, li longe rigardis, kiel lia malamiko sibilis, ŝrumpis kaj finfine transformiĝis en neĝe blankan buleton de cindro. Li blovis, kaj ĉio malaperis.

La sekvan tagon la paciento ekfartis pli malbone. Terure pala, kun enfalintaj vangoj, kun brulantaj okuloj, profundiĝintaj en la okulkavoj, li, ŝanceliĝante kaj ofte stumblante, daŭrigis sian furiozan paŝadon kaj parolis, parolis senĉese.

— Mi ne volus apliki perforton, — la ĉefkuracisto diris al sia asistanto.

— Sed ja necesas haltigi tiun laboron. Hodiaŭ li pezas naŭdek tri funtojn. Se tio daŭros, li mortos post du tagoj.

La ĉefkuracisto enpenŝiĝis.

— Ĉu morfino? Ĉu kloralno? — li diris duondemande.

— Hieraŭ morfino jam ne efikis.

— Ordonu ligi lin. Tamen mi dubas, ke li restos vivanta.

VI

Kaj oni ligis la pacieron. Li kuŝis, vestita per trudkitelo, firme ligita al la feraj rungoj de sia lito per larĝaj tolbendoj. Sed la furiozo de liaj movoj ne malpliĝis, prefere kreskis. Dum multaj horoj li obstine penis liberigi sin de la ligiloj. Finfine foje per forta impeto li disŝiris unu el la bendoj, liberigis la gambojn kaj, elglitinte el sub la ceteraj bendoj, komencis kun la ligitaj brakoj paŝi en la ĉambro, kriante sovaĝajn, nekomprenblajn vortojn.

— Ho, vi, damnita!.. — la enirinta gardisto ekkriis en la ukraina lingvo. — Kiu diablo vin helpas! Gricko! Ivan! Venu rapide, ĉar li malligis sin.

Ili trioje ĵetis sin sur la pacieron, kaj komenciĝis longa luktado, laciga

por la atakantoj kaj turmenta por la sin-defendanto, kiu estis elspezanta la reston de sia elĉerpita forto. Finfine oni faligis lin sur la lito kaj ligis eĉ pli firme ol antaŭe.

— Vi ne komprenas, kion vi faras! — la paciento kriis, anhelante. — Vi pereas! Mi vidis la trian, ĵus ekflorintan. Nun ĝi jam pretas. Lasu min fini la aferon! Endas mortigi ĝin! Mortigi! Mortigi! Tiam ĉio estos finita, ĉio savita. Mi sendus vin, sed fari tion povas nur mi. Vi mortus pro sola tuŝo.

— Silentu, juna sinjor', silentu! — la maljuna gardisto diris kaj restis deĵori ĉe la lito.

La paciento subite eksilentis. Li decidis trompi la gardistojn. Oni tenis lin ligitan dum la tuta tago kaj lasis en tiu stato por la nokto. Nutrinte lin per vespermanĝo, la gardisto sternis ion apud la lito kaj kuŝiĝis. Post unu minuto li profunde dormis, kaj la paciento komencis la laboron.

Li fleksiĝis tutkorpe por tuŝi la feran laŭlarĝan rungon de la lito kaj trovinte ĝin palpe per la mano, kaŝita en la longa maniko de la trudkitelo, komencis rapide kaj forte froti la manikon kontraŭ la fero. Post iom da tempo la dika veltolo cedis, kaj li liberigis la montrofingron. Poste la afero rapidiĝis. Kun lerteco kaj elasto tute nekredeblaj por sana homo li malligis malantaŭ si la nodon, kiu kuntenis la manikojn, malŝnuris la kitelon kaj post tio longe fiksaŭskultis la ronkado de la gardisto. Sed la maljunulo dormis profunde. La paciento demetis la trudkitelon kaj malligis sin de la lito. Li estis libera. Li ekzamenis la pordon: ĝi estis ŝlosita elinterne, kaj la ŝlosilo probable kuŝis en la poŝo de la gardisto. Timante veki lin, li ne kuraĝis esplori la poŝojn kaj decidis foriri el la ĉambro tra la fenestro.

Estis kvietaj, varma kaj malluma nokto. La fenestro estis malfermita. Steloj brilis en la nigra ĉielo. Li rigardis ilin, distingante konatajn konstelaciojn kaj ĝojante pro tio, ke ili, kiel al li ŝajnis, komprenas lin kaj kunsentas kun li. Palpebrumante, li vidis senfinajn radiojn, kiujn ili sendis al li, kaj la freneza decidemo kreskis. Li bezonis fleksi flanken dikan stangon de la fera krado, rampi tra la mallarĝa breĉo en la strateton, kovritan de arbustoj, transgrimpi la altan ŝtonan barilon. Tie estos la lasta batalo, kaj poste — venu eĉ morto.

Li provis fleksi la dikan stangon permene, sed la fero ne cedis. Tiam, plektinte ŝnuron el la fortikaj manikoj de la trudkitelo, li kroĉis per ĝi lancon, forĝitan ĉe la fino de la stango, kaj ekpendis sur ĝi tutkorpe. Post senrezulta streĉo, preskaŭ elĉerpinta la restaĵo de lia forto, la lanco fleksiĝis. La mallarĝa elirejo estis malfermita. Li puŝis sin tra ĝi, skrapvundante siajn ŝultrojn, kubutojn kaj la nudajn genuojn, trapenetris la arbustaron kaj haltis antaŭ la muro. Ĉio silentis. La lumo de noktaj lampoj lumigis elinterne la fenestrojn de la grandega domo. Neniu estis videbla en ili. Neniu rimarkos lin. La maljunulo, deĵoranta ĉe lia lito, verŝajne, dormis profunde. La steloj tenere palpebrumis per la radioj, penetrantaj en la profundon de lia koro.

— Mi venas al vi, — li flustris, rigardante la ĉielon.

Falinte post la unua malsukcesa provo, kun forŝiritaj ungoj, sangantaj manoj kaj genuoj, li komencis serĉi oportunan lokon. Tie, kie la barilo kuniĝis kun la muro de la kadavrejo, el ĝi kaj el la muro estis elfalintaj kelkaj brikoj. La paciento palpe trovis la breĉojn kaj uzis ilin. Li surgrimpis la barilon, kaptis la branĉojn de ulmo, kreskanta transe, kaj senbrue malsupreniĝis laŭ la arbo sur la teron.


Li jetis sin al la konata loko ĉe la perono. La kapeto de la floro, kunmetinta la petalojn, klare kaj kontraste malhelis en la rosa herbo.

— La lasta! — la paciento flustris. — La lasta! Hodiaŭ estos venko aŭ morto. Sed por mi jam tute ne gravas. Atendu: mi baldaŭ estos kun vi, — li diris, rigardante la ĉielon.

Li elŝiris la planton, dispecigis ĝin, ĉifis kaj, tenante ĝin enmane, revenis samvoje en sian ĉambron. La maljunulo dormis. La paciento, tuj post kiam li venis al la lito, falegis sur ĝin svene.

Matene oni trovis lin malviva. Lia vizaĝo estis kvietaj kaj serena. La konsumitaj trajtoj kun la maldikaj lipoj kaj profunde enfalintaj fermitaj okuloj esprimis fieran feliĉon. Kiam oni metis lin sur brankardon, oni provis malfermi lian manon kaj elpreni la ruĝan floron. Sed la mano rigidigis, kaj li forportis sian trofeon en la tombon.

Tradukis **Mihail Povorin**
Pro ĉi tiu traduko Mihail Povorin iĝis laŭreato de *Liro-2005* en la branĉo *Traduka prozo el la rusa lingvo*.



Georg Trakl

Vintre

*En frida blank' la agra bril'.
Soleca ĉielo sin vaste etendas.
Super lag' monedoj flug-pendas,
Ĉasistoj venas de l' silvo-hil'.*

*En nigraj pintoj loĝas silent'.
Huŝ! fajra brilet' elkabane.
Foj-foje sleda tint' lontane,
Leviĝas lante lun-arĝent'.*

*Dissangas vild' ĉe kampa lim'
Kaj korvoj plaŭdas en sangaj riveroj.
Pafite trem-flavas kaneroj.
En vaka bosk': frost', fum', paŝim'.*

Tradukis el la germana
Reinhard Haupenthal

Georg Trakl (1887–1914). Post farmaciaj studoj militara apotekisto frue drog-dependa. Grava aŭstra lirikisto de la frua ekspresionismo kun metaformismo kaprica kaj malfacile alirebla. Influita de la franca simbolismo (Baudelaire, Rimbaud, Verlaine). Per obskuraj vizioj, molaj versoj muzikemaj profetas la venontan kaoson de sia epoko pereoporta kaj katastrof-graveda per tonoj ve-sopiraj, profunda funebro, melankolio kaj rezignacio. Liaj temoj: la demoneco de la vivo, la mavo, kulpo, sufero, pereemo, morto kaj neniigo. Rimitan lirikon sekvis liber-ritmaj himnoj kun loziĝo de logike-sintaksaj strukturoj. Trakl forte influis la ekspresionisman lirikon kaj la germanan lirikon post 1945. **R.H.**



Libroj, kiuj lumigas homojn

Atribuinte ĉi-jaran premion por literaturo al Orhan Pamuk, la Nobela Komitato post kelkaj dubindaj decidoj faris finfine bonan, prudentan kaj meritoplanan elekton. Komprenoble, kelkaj samlandaj malprogresemluloj nur indigne gratulis Pamuk-on. Ankaŭ kelkaj eksterlandaj kverelemuloj suspektis decidon motivitan politike. (Tamen ili ne komprenas, ke preskaŭ ĉiu valora literatura verko estas iusence politika, sed preskaŭ neniu politika verko estas literature valora.)

Politiko

Do, iom pri politiko. En Turkio estas abomena §301: se vi iel makulas la “turkecon”, inkluzive de la honoro de la ŝtato, vi estos punita. Sekve preskaŭ ĉiu grava artisto kaj verkisto en Turkio estis iam en konflikto kun tiu paragrafo, kiu efektive estas honto por turkeco. Pro inercio de la okcident-eŭropa publiko ne ĉiuj procezoj surbaze de tiu abomena paragrafo estas vaste konataj (<http://memri.org/bin/articles.cgi?Page=archives&Area=sd&ID=SP106606>), tamen la klopodo procezi kontraŭ Pamuk kaptis la atenton. Pamuk aludis en 2005 en svisa gazeto, ke okazis amasmurdado fare de turkoj, sed li evitis la uzon de la vorto genocido, sed tio jam sufiĉis por ofendi “turkecon”.

Armenoj

En literatura prilaboro Pamuk distilis la nuntempan realecon en la romano *Neĝo* (Kar, 2002) — la plej “politika” romano, kiun li verkis ĝis nun. En la eta urbo Kars, proksime al la limoj al Armenio kaj Kartvelio iam ekzilita ĵurnalisto Ka (la nomo ja vekas asociojn al Kafka) renkontas mikrokosme malsamajn tavolojn de la turka socio. Dum tri tagoj ĉiuj loĝantoj estas baritaj de la ekstera mondo; ili jam estas eta mondo en si mem: turkoj, kurdoj, armenoj, rusoj kaj pliaj malplimulto — modelo por la bunta multfaceteco de Turkio. Ili vivas en diversaj tavoloj de la historio, estas kvazaŭ samtempo de malsamtempaĵoj. Kars fariĝas la kampo de streĉo inter Oriento kaj Okcidento. (Ĉu tio ne memorigas nin pri “nia urbeto” en la *Demonoj* de Dostojevskij?) Inter tiuj influoj vivas

homoj kun siaj streboj, serĉante individuajn identecon, feliĉon — kaj antaŭ ĉio dignon. Pamuk mirinde donas al ili personan voĉon. Ofte li klopodas eviti kliŝajn etiketojn, vortojn, kiuj nur emociigas la debaton kaj baras la vojon al kompreno. Eble ŝarioŝatanto estas pli neŭtrala nomo ol islamisto, aŭ ribelulo sonas pli afable ol PKK-teroristo... Ĉiukaze Pamuk donas al ni novan rigardon al eventualaj motivoj de homoj, kiuj fuĝas en religion aŭ terorismen, kaj ankaŭ ili fariĝas parto de lia literatura kosmo.



“Kial mi estas tiu, kiu mi estas”

Komprenigi la malsamecon kaj percepti samajn strukturojn en la orienta kaj okcidenta pensmaniero estas unu el la grandaj temoj de Pamuk. En *La Blanka Kastelo* (Beyaz kale, 1985) juna italo estas kaptita de turkoj kaj pludonita al iel freneza sciencisto. Tiu promesas al la italo la liberecon kontraŭ scio. Ili similas fizike unu al la alia kaj iom post iom iliaj identecoj preskaŭ kunfandiĝas, kaj la leganto ne plu scias, kiu estas la turka mastro kaj kiu la itala sklavo. Orienta religiemo kaj okcidenta raciemo kuniĝas.

En tiu frua romano Pamuk ankoraŭ ludas kun la mistika elemento kaj li plezurigas per ŝaradoj en la maniero de *La nomo de la rozo* de Eco. Pli serioze li prilaboras la mistikan temon en *La Nigra Libro* (Kara kitap, 1990) kaj en *La Nova Vivo* (Yeni hayat, 1994). En ambaŭ romanoj la protagonisto serĉas sian koramikinon. En la unua libro la serĉo okazas en la labirintoj de Istanbul, en la dua Pamuk gvidas nin tra same labirinta Turkio.

Metaforoj

Pamuk utiligas en mirinde efika maniero metaforojn. En ĉi tiu artikoleto mankas loko por vaste montri, kiel li faras tion. Do, nur eta ekzemplo

(bedaŭrinde mi devas traduki laŭ traduko, ĉar mi ne kapablas legi la lingvon de la verkisto) el *Neĝo*:

Mi rigardas la scenon dum la nokto, en mallumo, el fenestro. Ekstere estas du blankaj muroj, altaj kaj sen fenestroj, kiel la muroj de kastelo. Kiel du muroj, kiuj frontas unu la alian. Mi rigardas timeme en la malvastan abismon inter ili, kiu etende eliras antaŭ mi. La strateto en la loko, kie Allah ne estas, estas, kiel en Kars, neĝkovrita kaj marĉa, sed ĝia koloro estas siringi-viola. En la mezo de la strateto estas io, kio diras “Haltu!” al mi, kaj mi rigardas ĝis la fino de la strateto, ĝis la fino de la mondo. Jen estas arbo, nuda arbo sen folioj. Pro tio ke mi rigardas ĝin, ĝi subite ruĝiĝas kaj ekkaptas fajron. Tiam ekestiĝas en mi kulposento, ĉar mi estis scivolema pri la loko, kie Allah ne estas. Tiam la arbo reprenas sian antaŭan malhelan koloron.

La leganto renkontas dise similajn erajn bildojn, kiuj iom post fariĝas densa ampleksaĵo — sed ankaŭ sen rekoni tiujn bildojn eblas frandi liajn librojn.

En *La Nova Vivo* Pamuk esploras la paralelojn inter romantika naturmistikismo (la libro havas moton de Novalis) kaj islama sufi-mistikismo (magra klarigo en Esperanto: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Sufiismo>). La vojo al mistika sperto estas ofte priskribita kiel vojaĝo — ekzemple en la verkoj de Tereza el Avila kaj Johano de la Kruco. Same la personoj vojaĝas multe serĉante koramikon. Tiu unuiĝo kun la koramiko estas la celo de sufi-mistikulo. Tiu celo estis ĉiam suspekta por ajna ortodoksio, simple pro tio, ke la mistikuloj havas perspektivon, kiu estas pli vasta ol la mallarĝeco de dogmo permesas. (En la kristana mondo tiu sperto, kiu troveblas en ĉiu religio havas foje la nomon *kenosis*. Vidu: Karen Armstrong *The Great Transformation*, 2006). Pamuk vidas en tio kunligan elementon inter Okcidento kaj Oriento kaj se homoj interatentas, kion ili kunigas, tiam ili espereble ne plu parolas pri Okcidento kontraŭ Oriento, sed anstataŭas tiujn etiketojn per Progreso kaj Malprogreso.

Kaj nemistikuloj? Ili havas kompleksan vivon, peritan de la literaturo. “Ĉar nenio povas esti tiel mirinda, kiel la vivo. Krom la literaturo. Krom la literaturo. Jes, komprenoble, krom la literaturo, la ununura konsolanto”.

Wolfgang Kirschstein

Piratado kaj sabotado de esperanto-muziko

Iom koncizigita teksto, kompilita de Flo je debato inter artistoj kaj aktiviluloj de EUROKKA / *Vinilkosmo*.

De pli malpli tri jaroj muziko suferas akran krizon pro la novaj teknologioj, kiuj evoluas fulmrapide (interreto, MP3, podkasto...). Al tio aldoniĝas senbrida KD-kopiado pro granda disvastiĝo de personaj komputiloj. La disko-industrio konstatastas drastan falon de vendoj, KD-fabrikejoj fermiĝas kaj maldungas sian personaron. Kelkaj eldonejoj serĉas alternativojn vendante muzikojn rete. Eĉ bandoj provas aperigi siajn albumojn ne sur KDoj sed sur USB-ŝlosiloj. Sed neniu scias, kio okazos kun la muziko en la venontaj jaroj.

Esperanto-muziko havas la samajn problemojn kiel la malgrandaj eldonejoj, sed la konsekvencoj estas pli gravaj ol por la neesperanta muziko, ĉar muzikeldonejoj malmultas en Esperantio. Unu el la ĉefaj, *Vinilkosmo*, de longe atentigas pri la rapida evoluo de la aktualaj teknikoj kaj pri la danĝero de kopiado de diskoj kaj de elŝutado en interreto.

La tuj sentebla konsekvenco estas falo de la diskovendoj kaj kresko de senpaga muzikelŝutado en interreto. Tio okazas, kvankam la artistoj kaj *Vinilkosmo* disponigas libere du-tri muzikojn de ĉiu albumo varbcele en la reto (*Vinilkosmo*, *MusicExpress*, ktp.).

Eldoni muzikon ne estas simple preni la muzikon de disko kaj meti ĝin enreten... Eldoni muzikon estas grandega laboro unue de la artistoj, kiuj elpensas ĝin, verkas, komponas kaj poste ludas, kantas kaj registras la muzikon... por kelkaj artistoj tio postulas jarojn da senĉesaj streboj kaj sinoferoj. Poste la eldonejo kunlaboras kun la artistoj por produkti, eldoni kaj distribui la artajn verkojn... kaj zorgi pri la “komerca” flanko de la muziko.

Tiu komerca flanko estas produktado kaj eldonado de muziko, kaj ĝi kostegas. Nur dank’ al la vendado de la diskoj eldonitaj eblas daŭrigi la produktadon kaj eldonadon de novaj diskoj. Tiel mono investita en muziko povas esti reinvestita por novaj produktaĵoj.

Por havi ideon, kiom kostas produkti kaj eldoni diskon, en la sekva tabelo estas dispartigitaj kostoj por unu el la lastaj eldonoj de *Vinilkosmo*. Temas pri

eldono de 1000 ekzempleroj kaj la tuta produktokosto 9880 EUR.

Suma prezo por unu KD estas 15,05 EUR sen imposto (vendoprezo al la publiko)

Surbendigaj kostoj	4,65 EUR
Mastrigado	1,07 EUR
Grafika laboro	1,01 EUR
Aŭtorrajtoj	1,06 EUR
Presado	1,57 EUR
Varbado	1,63 EUR
Tantiemoj	0,92 EUR
Administrado /Stoko	2,00 EUR
Profito	1,15 EUR

La plej malbona situacio estas en la Suda Ameriko, Afriko kaj Azio, kie esperanto-muziko ne estas alirebla pro la altaj prezoj de la eŭrope eldonitaj diskoj. *Vinilkosmo* serĉis solvojn per partnera eldonado kun BEL (Brazila Esperanto-Ligo) por disponigi siajn diskojn en la Suda Ameriko (bedaŭrinde, ĝis nun sensukcese). Nun estas nova projekto starigi partneran eldonadon kun *Kosmuzik* en Brazilo. Sed organizacion postulas tempon kaj, ĉefe, monon. Dume la situacio malpliboniĝas...

Vinilkosmo ekspertis novan fenomenon: piratado en retpaĝoj kaj blogoj. La unua, kiu tiel agis, estis bazita en Argentino kaj tute kontraŭleĝe disponigis por libera elŝutado ses albumojn de *Vinilkosmo* kaj unu de BEL. Tio estas senskrupule ŝtela misago. Ĝi sabotas la laboron por esperanto-muziko, kiun la artistoj kaj la eldonejoj strebas fari.

Artistoj kaj muzikeldonejoj estas intime ligitaj kaj funkcias kune, ĉar ili helpas unu la alian, kaj ili bezonas unu la alian... La muzikoj de eldonitaj diskoj apartenas al la artistoj, kaj neniu rajtas uzi ilin por publika disvastigo, krom se estas interkonsento kun la artisto/eldonejo. Ne eblas fari kion ajn pere de muzikoj, kiuj apartenas al la artistoj, kaj certe ne eblas disponigi ilin senpage al la publiko, sen peti la permeson de la artistoj kaj eldonejo, precipe kiam la diskoj estas vendataj.

Esperanto-muziko estas unu el la plej vivantaj partoj de la esperanto-kulturo. La eldonejoj strebas teni ekvilibron por daŭre alporti al la esperanto-movado kaj al esperanto-kulturo konstantan fluon de novaj eldonaĵoj, de novaj artistoj. Piratado (ŝtelado de muziko) frakasas tian laboron kaj povas rapide dronigi la eldonejojn... Ĝi rompas la ekvilibron de la eldonejoj kaj endanĝerigas la eldonejojn kaj la artistojn, kaj eĉ la muzikan kulturon mem... Tial pro piratado post kelkaj



jaroj la esperanta kulturo povos rapide eksuferi, malriĉiĝi kaj kadukiĝi.

Feliĉe, ĉi-foje la artistoj kaj *Vinilkosmo* sukcesis argumenti kaj konvinki la piratan blogon ĉesigi tiun sabotadon. Se tio ne okazus, la eldonejo estus devigita interrompi sian aktivadon kaj prokrastigi aŭ forlasi siajn projektojn kaj preparatajn produktaĵojn por eviti bankrotiĝon.

Neniu eldonisto prenas riskon, eldonante diskojn, sen esti certa disvendi ilin. Neniu esperanta eldonejo havas financajn rimedojn por riski fiaskon pro mallojala konkurenco fare de piratoj. Kiam la eldonejoj ĉesos produkti novajn muzikojn kaj ne plu reldonos elĉerpitajn diskojn, la piratoj malaperos, ĉar ili nenion plu povos pirati sed certe tiam jam estos tro malfrue. Sed dubindas ke piratoj mem ekproduktos esperanto-muzikon por disdoni ĝin senpage interrete.

Espereble, la piratoj ĉesos aktivi kontraŭ la profesie eldonita esperanto-muziko antaŭ ol estos tro malfrue kaj esperanto-muziko fariĝos dezerto... Sed estu ege klare, ke **esperantisto, kiu elŝutas piratitan muzikon, fariĝas komplico kaj respondecas pri la mortigo de esperanto-kulturo kaj kontribuas al ĝia entombigo.**

Nura ebla subteno estas aĉetado de la originalaj diskoj. Varbcele estas disponeblaj tute libere muzikoj ĉe <http://www.musicexpress.com.br/novaĵoj.asp> kaj muzikvideoj ĉe <http://farbskatol.net/>

Ĝeneralaj informoj pri esperanto-muziko haveblas ĉe <http://artista.ikso.net>

En la retejo de *Vinilkosmo* eblas aĉeti diskojn: www.vinilkosmo.com

Kontribuis: **Emilio Cid, Bertilo Wennergren, Martin Wiese, Ferriol Macip, Rogener Pavinski, David Emil Wickström, Gunnar Fischer, Jean-Marc Leclercq, Ĵenja Amis, Amir Hadziahmetović, Flavio Fonseca kaj Floréal Martorell**

Gajan Kristnaskon!

Osmakowicz, Anna. *En Kristnaska hor'*: Kristnaskaj kantoj kaj pastoraloj kantataj en Pollando. — [s.l.] LG- Mix, 2005.

Esperanta muzika kulturo dum sia ne tiom longa evoluo ensorbis multajn kantojn de diversaj popoloj. La plej bona disvastigo de la kantoj eblas, se ili estas fiksitaj en iu sonportilo: disko, bendo, kasedo. Lastatempe aperas multaj diskoj enhavantaj muzikon kun teksto en esperanta traduko. Sed kompreneble ili ne sufiĉas por konatigi plurnacian esperantistaron kun riĉa nacia kanta kulturo. Tial apero de la disko *En kristnaska hor'*, en kiu Anna Osmakowicz kantas popularajn en Pollando Kristnaskajn kantojn, estas bonvena.

Kristnaskaj kantoj, kvankam ili estas ŝatataj kaj ofte kantataj en multaj landoj, ne tiom ofte aperas en Esperanto. Oni povas nomi nur la diskon *Kristnaska kordo* (25 kantoj, 2003) de senakompana kantgrupo el Nederlando *Akordo*. Inter 14 kantoj en la nova disko de Anna Osmakowicz nur 2 koincidas kun tiuj en la disko de *Akordo*: “Paca nokt” kaj “Blankan Kristnaskon” (ĉe *Akordo* ĝi nomiĝas “Kristnasko blanka”). Sed en ĉi disko estas alia traduko (eĉ esperantigita el alia lingvo) kaj la kantmaniero de Anna estas tute alia. Ŝi kantas sola kun elektromuzika akompano farita de Leszek Gryczka, kio ebligas al ŝi pli libere trakti ritmon de l' kantoj kaj variigi ties melodiojn.

La kantoj estas bele prezentitaj danke al ĉarma foto farita de Juliusz Multarzyński, kovrilpaĝo kaj grafika prilaboro de Adam Bolesta kaj preso de *Vegart*. Aparta agrabla surprizo por muzikantoj estas en tio, ke la teksta suplemento enhavas ankaŭ muziknotojn de preskaŭ ĉiuj kantoj (krom la lasta).

Perfektaj laŭ sia beleco melodioj de la prezentitaj kantoj, multaj el kiuj estis dum jardekoj kaj eĉ jarcentoj de sia estado en popolo pliharmoniigitaj, ne povas lasi aŭskultanton indiferenta. Bela voĉo de la kantistino plifortigas trankvilecon, harmoniecon kaj pacemon, kiujn portas la kantoj al homaj animoj.

La Kristnaskaj kantoj sekvas unu la alian ne en hazarda ordo, sed sinsekve laŭ enhavo (serĉado de loko por la naskiĝo, mem naskiĝo, informo pri



naskiĝo, veno de la paŝtistoj kun donacoj, la unuaj agoj de Dio, komuna Kristnaska festo) kaj kontraste laŭ muziktipo. En iuj kantoj oni povas facile malkovri praĝenojn de ĉi kanto. Ekzemple, “Al Paŝtistoj la anĝel” similas mezepokan ĥoralon, kaj “Di’ naskiĝas” — polan solenan dancon *polonezo*.

El 14 kantoj nur en 5 estas indikita aŭtoro, ĉiuj aliaj havas nur rimarkon, ke la kanto estis verkita en la XVIIIa aŭ XIXa jarcento. Plejparton de la kantoj tradukis en esperanton Wiesław Tomaszewski kaj kelkajn kantojn — Irena Łowińska. Esperanta teksto sonas bele. Bedaŭrinde mi ne povas kompari kun originalo, ĉar ne havas tekstojn en alia lingvo. En kelkaj lokoj oni povas renkonti nekoincidon de silabaj kaj muzikaj akcentoj (“Alrapidis Betleĥemon”). Tio povas okazi en antikva aŭ popola muziko. Eble simila strangaĵo estas en originalo, sed kiel tion kontroli? Estus

Stel’ arĝenta

muziko: Andrzej Seroczyński
vortoj: Anna Warecka
tradukis Wiesław Tomaszewski

*Vintratage portas sledo tra senvoj’
vespermanĝi en la hejma rond’;
karp’ fritita, ruĝa barĉo, prunkompot’,
sur la tablo helas festkandel’.*

*Stel’ arĝenta brilas for,
la patrino batas kor’,
ĉar vekigis tag’ de l’ fest’;
aromas arb’ en verda vest’...
Brilas la arĝenta stel’,
pac-oblat’ en blanka hel’,
tremas la patrino man’
tra l’ vaksa varma flam’.*

*Sub arbeto kuŝas ĉies kor-donac’,
al fenestro frapas griza frost’,
en la kripo Betleĥema Krist-Infan’,
sur ĉielo jen unua stel’.*

El la disko *En kristnaska hor’*

bone, se oni aldonus al la disko dulingvan tekston.

Certe, granda laboro de diskproduktintoj ne povis resti sen mankoj. Tiuj ne forstrekas meritojn de la tuta disko, ĉar temas pri mistajpaĝoj sur la koverto kaj en la akompana broŝuro, i.a., pro iuj problemoj kun ĉapelitaj literoj.

Bone, ke estas muziknotoj kun literitaj akordoj, sed estus eĉ pli bone, se ili koincidus al reala kantado de Anna Osmakowicz. Tio okazas ne ĉiam. En kelkaj kantoj muzika enkonduko reale sonanta estas tute alia ne nur rilate al skribitaj muziknotoj mem, sed ankaŭ rilate al kvanto de taktoj en tiuj (“Alrapidis Betleĥemon”, “Paca nokt”, “Dum nokt’ silenta”, “Al la kripo”, “Di’ naskiĝas”). Tiukaze pli bone estas, se muzika enkonduko, interstrofa muziko kaj postmuziko estas tute ne fiksita en muziknotoj, ĝuste tiel, kiel estas en kantoj “Mankis la loko”, “Al Paŝtistoj la anĝel”, “Stel’ arĝenta”, “Ni faru lumojn”. Ankaŭ tute strange estas, ke la unua kanto “Mankis la loko” voĉe sonas en minoro, sed estas skribita en majoro. Foje okazas, ke paŭzoj inter tekstaj linioj en muziknotoj forestas, kvankam en reala kantado ili ĉeestas en ĉiuj strofoj (“Mankis la loko”).

La kantistino klare prononcas ĉiujn vortojn, tamen aŭdeblas ofta peko de slavoj kaj litovoj: *j* inter *i* kaj posta vokalo.

Estas videble, ke la tekstoj kaj notoj de diversaj kantoj estas prenitaj el diversaj fontoj kaj oni eĉ ne provis sistemigi muziknotan kaj tekstan skribmanieron. Jen estas skribitaj notoj kun vortetoj (“Mankis la loko”), jen en similaj kondiĉoj — kun interlinioj (“Alrapidis Betleĥemon”). En la teksto iam nova tekstlinio koincidas kun komenco de nova frazo en muziko (“Alrapidis Betleĥemon”), sed iam tiu estas tute hazarda (“Marŝu vigle”). En iuj tekstoj tute nekompreneble estas uzita haltostreko (“Mankis la loko”, “Dum nokt’ silenta”, “En Betleĥemo”, “Kiam la Kristnaskon”).

La kantmaniero de Anna Osmakowicz ne povas ne allogi aŭskultantojn per tute libera persona interpreto, ĉarma sed iam malproksima de la aldona skribita muziknota teksto. Povas esti, ke ŝi pravus, ĉar originalo nuntempe jam ne aktualas. Do, aŭskultu kaj decidu mem!

Irina Mironova

Belartaj konkursoj de UEA en 2007

La Belartaj Konkursoj de UEA invitas partoprenantojn por la 58a fojo. La rezultoj oni anoncos en la 92a Universala Kongreso en Jokohamo. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj en ajna formo. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200×65 karaktroj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la UK. Premio “Luigi Minnaja” kaj du aliaj premioj.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. La melodion oni povas sendi KD-e, rete, sonbende aŭ skribe (notoj), la tekston rete aŭ papere. Premio “An-Song-san” kaj du aliaj premioj.

Filmo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo. Daŭro inter 15 kaj 60 minutoj. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro (alia ol lernolibro), presforme aperinta en 2006. Unu premio.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo oni sendu ilin en unu ekzemplero; por kanto oni sendu en kvar ekzempleroj se KD-e aŭ sonbende; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 2007. Por filmo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 2007.

Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; rete ela.lipari@tiscali.it.

La konkursaĵoj (krom infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkuras. Se oni sendas la konkursaĵojn rete, oni indiku la elektitan pseŭdonimon.

Premioj: Unua premio: 230 eŭroj; dua premio: 161 eŭroj; tria premio: 92 eŭroj; Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 161 eŭroj; Infanlibro de la Jaro: 483 eŭroj.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Ricevitaj libroj

Bronikowska, Maria. *Pri Janusz Korczak flustre*: Poemaro / Tradukis el la pola Irena Szanser. — Czeladź: Hejme, 2006. — 36 pĝ. — [Donaco de Hejme].

Florenco — spuroj de alia historio. — Firenze: Comune di Firenze; Pisa: Edistudio, 2006. — 24 pĝ., il. — [Donaco de Aleksej Korĵenkov].

Kongresa libro. 91a Universala Kongreso de Esperanto. Florenco, 2006. — Rotterdam: UEA, 2006. 136 pĝ., il. — [Donaco de Aleksej Korĵenkov].

Kraft, Karel. *Heroo de amo*: La vivo de Přemysl Pitter. — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2006. — 196 pĝ., il. — [Donaco de KAVA-PECH].

Minnaja, Carlo; Ŝejpak, Anatolo. *Elektitaj lekcioj pri historio de scienco kaj tekniko.* — Moskvo: Moskva Ŝtata Industria Universitato, 2006. — 251 pĝ., il.; 300 ekz. — [Aĉeto].

Torino ĉiam moviĝanta / Tradukis el la itala Fabrizio Pennacchietti. — Torino: Città di Torino, 2006. — 20 pĝ., il. — [Donaco de Aleksej Korĵenkov].

Пирон, Клод. *Европейское хитросплетение языков* / Перевод с эсперанто Виктора Ароловича. — М.: РЭСЭ; Импэто, 2004. — 16 с. — [Donaco de Viktor Aroloviĉ].

Ricevitaj gazetoj

Esperanto. 2006/11; Esperanto-nyt. 2006/1; Ĝenerala Informilo. 2006/139; Heroldo de Esperanto. 2006/13,14; Internaciisto. 2006/6; Juna Amiko. 2006/2; KAE-Informilo. 2006/56; Komencanto. 2006/4,5; Kontakto. 2006/4; La Ondo de Esperanto. 2006/11; La Revuo Orienta. 2006/10; La Sago. 2006/29; Literatura Foiro. 2006/223; Litova Stelo. 2006/5; Monato. 2006/11; Pola Esperantisto. 2006/5; REGo. 2006/5; Scienco kaj Kulturo. 2006/5; Sennaciulo. 2006/10; Service de Presse. 2006/29; SES Informas. 2006/4; Tempo. 2006/2,3; Vekilo. 2006/2.

Gazetoj

Literatura Foiro. 2006: 223

La oktobra *Literatura Foiro* proponas fragmenton el *Retrovo* de Fred Uhlman, lastan tradukon de William Auld, kun komentario de Perla Martinnelli. Poemoj de Giorgio Silfer, Benoît Philippe kaj de Manuel de Seabra omaĝas la forpasintan William Auld.

Jozefo Horvath rememorigas pri la pioniro Sándor Giesswein. La redakcio intervjuas Vanja Ĵeljzokova pri la granda E-historia ekspozicio en Orjahovo. Dimitar Haĝiev prezentas la projekton pri la kreo de monda organizo proponitan de Nikola Dimkov en 1917.

Unu frazo pri tiraneco de Gyula Illyés estas reeĥo de la Hungara Revolucio en 1956, kaj la traduko de Giorgio Silfer estas dediĉita al la ĵurnalisto Ljudmila Politkovskaja kies mortigo en Moskvo afliktis la demokratian mondon.

En la rubriko “Premiere”: *Fino ĉe la esenoj*, ĉapitro el la nova romano de Trevor Steele eldonota jarfine. Carlo Minnaja eszas pri *La Princo* de Niccolò Machiavelli.

Valdo Banaitis kontribuas al la debato pri la altrudo de etnolingvaj signifoj al E-vortoj, kadre de kiu en la antaŭaj numeroj aperis artikoloj de Dimitar Haĝiev, László Radacsy, Floriano Pessoa, Miroslav Malovec.

La revuo, kiel organo de la Lingva Komitato de Esperantio, publikigas la decidon pri surogataj alfabetoj.

HeKo

2007, ĉu la lasta jaro por Pola Esperantisto?

Karaj legantoj de *Pola Esperantisto*. Preskaŭ finiĝas la antaŭlasta jaro de eldonado de via revuo, kiu post 13-jara “muta” periodo renaskiĝis, danke al interkonsento de la Eldonejo Hejme kaj PEA. Fine de la venonta jaro la periodo de tiu ĉi interkonsento finiĝos, kaj nun mi ne konas rimedojn aŭguri, kio okazos poste.

Dum la ĝisnunaj kvar jaroj PE fariĝis pli kaj pli populara kaj interesa legaĵo, precipe tamen por eksterlandaj esperantistoj, de kiuj venas laŭdaj leteroj kaj dankesprimoj. “Finfine la revuo, kiu ne estas plenigita de primovadaj novaĵoj, prenitaj de Interreto” — tia opinio plejmultas. “Viaj artikoloj pri pola literaturo estas vere impresaj” — aplaŭdas la aliaj.

Kazimierz Leja
(*Pola Esperantisto*, 2005, №5)


Por la septembra tasko “Amantaj paroj” venis 15 respondoj, inter kiuj nur unu ne estis ĝusta.

Ilin sendis: Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Andrej Kirijenko (Bjelarusio), Bruno Lehtinen, Erkki Kemppainen (Finnlando), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Ester Olsen (Norvegio), Dorota Burchardt, Hanna Skalska (Pollando), Roland Larsson (Svedio), Bronislav Ĉupin, Svetlana Konjašova, Viktor Alikin (Ruslando), Ludmila Orajevskaja (Ukrainio).

La loto donis premion al **Viktor Alikin**, kiun ni kore gratulas!

La gusta respondo estas *Leontodo*.

La rado



Radradiojn konsistigas vortoj el Zamenhofaj proverboj. La vortoj skribendas centripete. La rado ne staras surloke, ĝi turniĝas kiel horloĝa montrilo. La vortoj cirkle ŝajnigas preterkuron de radradioj.

Centripete: 1. Pli bona estas vorto ..., ol kuko agrabla; 2. Tro rapida ... ne kondukas al celo; 3. Vivanton ni malhonoras, mortanton ni ... 4. Saĝo ..., sed ne profunda; 5. ... de almozoj neniam malriĉigas; 6. Negocaj ... estas severaj; 7. Kiu mem sin gloras, malbone...; 8. Kiu havas forton, havas ... 9. Formikoj, ... ne forta; 10. Du mastrinoj ĉe unu ... neniam vivas sen reciproka malbeno; 11. Kiu ... forŝovas, ĝin jam ne retrovas; 12. Ne gloze estas serĉi sian ...

Laŭ horloĝa movo: 13. Sinkronigita filmo; 14. Teatra verko; 15. Regnestro de Arabujo; 16. Valorpapero; 17. Gravurita desegno; 18. Elmontranta imponan luksan belecon; 19. Cirkloforma; 20. Dorsenire; 21. Kartvela vira nomo; 22. Rilata al floro, simbolo de pureco; 23. Rilata al substanco en kemio kaj farmacio; 24. Tago de semajno; 25. Situacio; 26. Sentumo; 27. Nea adjektivo signifanta: “de neniuj ajn speco, kvalito”

La respondon sendu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ 15 jan 2006.

Kompilis **Jurij Kivajev**

La redakcio de *La Ondo de Esperanto* serĉas karikaturiston.

SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ el la kolekto de reduktoro

Murdoj en Esperantujo

... turniĝi al si mem, forgesi movadon kaj eksterajn celojn... Parto de la ekstermaj raŭmistoj ĉirkaŭ Esperanta Civito subtenas tian agadlinion. (Jukka Pietiläinen. *Esperanta Finnlando*, 2006, №5, pĝ. 13; rimarkis Kalle Kniivilä)

Ĉe l' funebro Cezara ĉeesti, ne laŭdi

La lasta libro de prof. d-ro Humphrey Tonkin “Lingvo kaj popolo”... grandparte temas pri la ideologia kaj organiza testamento de Tonkin mem... (Giorgio Silfer. Tonkin pri raŭmismo en sia lasta libro, HeKo 315 6-A, 16 nov 2006, <http://www.esperantio.net/index.php?id=205>)

Kursorĉataj sin-orgioj?

Per la preparata propono, la konsorcio de la paktintaj establoj povos krei sinergiojn...

(Biblioteka Reto: preparata la direktivo, HeKo 314 1-C, 1 nov 2006, <http://www.esperantio.net/index.php?id=193>)

Kion saĝo diktas

Mi ne estas ne saĝa, ĉar mi ne devigas homojn ne ekzameni ĉe UEA. (Gbeglo Koffi, 1 nov 2006, <http://groups.yahoo.com/group/esperanto-en-togolando/message/312>)

Opio de l' popolo?

Kiaj ajn estas la opionioj de kelkaj, jes KELKAJ, pri mi, mi ĉiam iras mian vojon... (Gbeglo Koffi, 11 jul. 2006, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/2772>)

En la mondon venis nova... sen «t»

Fakte en la retejo de la Supera Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj... oni povas legi ankaŭ en Esperano... (Renato Corsetti. Semajno de homaj rajtoj kaj de Esperanto, *Esperanto*, 2006, №11, pĝ. 235)

Serĉe al temoj

Survoje. Klara Ilutoviĉ. ... Pli ol sesdek originalaj poemoj de sentema poetino. (<http://katalogo.uea.org/?inf=7636>)

Plukis **István Ertl**

ZEO estas ZEO, ja ne ZAO

La suba foto, kiun sendis Laimius Stražnickas, devus ornami la artikoleon pri la plej nova ZEO en Vilno sur la sepa paĝo de ĉi tiu *Ondo*.



Perantoj de "La Ondo de Esperanto"

Argentino: Roberto Sartor, Beruti 2792, 3° 9, C 1425, BBF, Buenos Aires

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, Caixa Postal 03625, Brasilia, DF 70084-970

Britio: David Kelso, 5 Craighenhill Road, Carluke, ML8 4QT

Bulgario: Grozdenka Filipova, str. Rajko Aleksiev 23, 4400 Pazardĝik

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: Jozefo Baksa, Pf. 115, HU-8901 Zalaegerszeg
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano

Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: Prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 4 Harlech Mews, Avonside, Christchurch, NZ-8004

Pollando: PEA, skr. poczt. 21, PL-44-101 Gliwice

Portugaliao: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530

Ne forgesu reaboni

Fabelkonkurso 2006

18 okt 2006 en la hotelo *Herkko* en Taivalkoski (Finnlando) okazis premiofesto de la tradicia fabelkonkurso.

Ĉi-jare venis 750 finnlingvaj, 10 samealingvaj kaj 11 esperantlingvaj konkursaĵoj. Esperantaj fabeloj venis el Ĉeĥio, Francio, Hungario, Germanio, Kubo kaj Belgio. Ĵurianoj de la Esperanto-konkurso estis Raita Pyhälä, Auli Vihermä kaj Sylvia Hämäläinen. UEA aŭspiciis la konkurson, kaj donacis libropremiojn.

En la festa ceremonio Aini Vääräniemi rakontis pri la esperantlingva konkurso al la ĉeestantoj, inter kiuj estis ĵurnalistoj el televido kaj gazetaro.

Precipe aktivaj en la Esperanto-konkurso estis ĉeĥoj, kiuj gajnis en ĉiuj aĝokategorioj: kategorio A (Jan Bauer, Jitka Rybkova), kategorio B (Denisa Pavlisova), kategorio C (Eliska Splichalova). Sed la premion *Fabelo Internacia* gajnis la grupa konkursaĵo *La tri herboj* kunverkita de Gretel Schumann (Francio), Alina Calibe Bruegger (Germanio), Aniko Slezak kaj Aniko Lilla Hegedus (Hungario).

La ĉefan premion de finnlingva konkurso gajnis Pinja Buller el Taivalkoski. Ŝia onklo estas Osmo Buller. Gratulon ankaŭ por Pinja!

Aini Vääräniemi



Bildo de Antonina Apollo

Internacia Fotokonkurso

La limdato de la naŭa Internacia Fotokonkurso estas prokrastita je unu monato al la 31a de decembro 2006.

La konkursaĵoj devas esti senditaj unu-ekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando).

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2007.

2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2007.

3. abono de *La Ondo de Esperanto* 2007.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2007) por la plej bona foto pri la temo *Naturo*.


La organizanto de la konkurso havos ĝis 31 dec 2008 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.




Fjodor Dostojevskij.
Blankaj noktoj: Ses prozaĵoj.
448 paĝoj, € 30,0.



Anton Ĉeĥov.
Ĉeriza ĝardeno: Noveloj, dramoj.
352 paĝoj, € 27,0.




Rusa Novelaro. Volumo 1
La 19a Jarcento.
400 paĝoj, € 30,0.




Samideanoj: Satiroj kaj humurajoj
pri Esperanto kaj pri esperantistoj.
80 paĝoj, € 7,5.



Georges Simenon.
Amiko el la junago de Maigret.
128 paĝoj, € 12,0.




Trevor Steele.
Diverskoloro: Originalaj prozaĵoj.
112 paĝoj, € 10,0.



Aleksander Korĵenkov.
Historio de Esperanto.
128 paĝoj, € 12,0.



L.L. Zamenhof
Mi estas homo.
288 paĝoj, € 24,0.



Aleksandr Duliĉenko.
En la serĉado de la mondolingvo.
160 paĝoj, € 15,0.